

Oomoto

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U. H. A. ★

1960

Julio-Aŭg

22-a Jaro N-ro 241-242 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-lu, Japanujo.

Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rieuwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Letero al la Amikoj de Japanujo

de la Scienca Fakultato de Kiota Universitato

La kelktempa brua "socia maltrankvilo" kaŭzita en Japanujo de la revizio de la Japana-Usona Sekurec-Traktato malaperis depost kiam Ĉefministro Nobusuke Kiŝi ekŝiĝis la 18-an de julio. Pli antaŭe, en la kulmino de la tutlanda manifestacio kontraŭ la traktato okazis la "Hagerty-incidento" kaj la "Nuligo de la planita vizito de Eisenhower al Japanujo". La du bedaŭrindaj eventoj estis raportataj al la mondo kun propaganda tendenco, kvazaŭ ili entute okazis sub la sistema instigo de l' internacia komunismo kaj havus nenion komunan kun la publika opinio, kiu kristaliĝis en la supre-menciita manifestacio. Por klarigi la fonon de ambaŭ eventoj ni prezentas ĉi tie leteron, kiun la profesorado de la scienca-teknika fakultato de Kiota Universitato (inkluzive de d-ro Hideki Jukaŭa kiel la subskribinto) sendis "al la amikoj" en la mondo. Ni konsideras, ke la enhavo reprezentas la opinion de la plimulto de la japana popolo, kaj esperas, ke ĝi donos lumon pri la aktuala korstato de japanoj, kies ĝusta kompreno ankoraŭ estas necesa por la amikoj de Japanujo — ĉar kvankam s-ro Kiŝi jam ekŝiĝis, la nova traktato, kiun li perforte sankciigis, postrestas valida.

La Red.

Ni sendas al vi tiun ĉi leteron dezirante, ke vi havos korektan komprenon pri la streĉa politika situacio, kiu regas ĉi tie de antaŭ kelkaj monatoj. Bedaŭrinde, la opinio de la japana registaro ne reprezentas la opinion de la plimulto de la japana popolo, kaj ni timas, ke tio kaŭzus multe da miskompreno inter la popolo eksterlanda.

Ni kredas, ke la bazo de internacia rilato devas esti fondita sur la ĝusta kompreno pri la politika cirkonstancaro en aliaj landoj. Kun tio en nia koro, ni deziras informi vin pri la aktuala situacio en Japanujo.

La nuntempan konfuzon en Japanujo kaŭzis la revizio de la Japana-Usona Sekurec-Traktato. Tiu problemo estis diskutata dum kelkaj jaroj. Antaŭ ĉio ni volas rimarkigi, ke tre granda nombro de la japana popolo ankoraŭ entenas seriozan suspekton pri la enhavo de tiu nova Sekurec-Traktato. Ĝi timas, precipe, ke la Traktato laŭleĝe validigos la militan aliancon inter Usono kaj Japanujo por la venontaj dek jaroj. Kiam ni rigardas la nuntempan tension inter Oriento kaj Okcidento, tia traktato okazeble ekpuŝus nian landon en la sferon de milita agado, kaj tio donus nenecesan eksciton al niaj najbaraj landoj kiel Ĉinujo kaj Sovetio, kaj tiel, alportus malbonajn rezultojn al la paco ne nur en la ekstrema oriento, sed ankaŭ en la mondo. Plie, en la Traktato ne estas montrite, ĝis kia grado japana opinio estos dece prikonsiderata de la usona registaro, koncerne la detalojn de tia probabla milita agado. La Traktato ŝajnas enteni la eblecon involvi la nacion en militon sendepende de la volo de la popolo. Ni dubas ankaŭ, ĉu tiu ĉi Traktato povas esti kongrua kun nia konstitucio, kiu eksplicite deklaras la rezignon de armadoj. Kaj nia suspekto fariĝis pli granda pro la fakto, ke la japana registaro kaŝadis en sekreto la proponitan revizion ĝis la tago, kiam la Traktato subskribiĝis en januaro.

Ni due deziras menci la tenigon de nia popolo rilate al Usono, ĉar en ĝi konsistas la suspektemo, kiun ni havas rilate al la Kiŝi-kabineto kaj ties negocado kun Usono. Kiam la nova konstitucio estis publikigita, la japana popolo, inklude de la ŝtatviroj tiam en ofico, tujkore bonvenigis la paragrafon 9, kiu deklaris la "rezignon de milito". Tia reago estis tute natura tial, ke ni tre multe suferis dum la milito kaj travivis la tragedion de atomarmiloj. Kaj tamen, la japana registaro ŝajne jam forgesis la hororojn de milito tiagrade, ke ĝi lasas sin, paŝon post paŝo, rekonstrui konstantan grund- kaj mar-armeon sub la nomo de "Defenda Korpuso". Por diri sincere, multaj japanoj opinias, ke tia stato devenis de la ŝanĝo en la "okupada" politiko de Usono. La situacio de nia lando fariĝis danĝera kaj la minaco je nova milito akuta dum la oficado de la Kiŝi-registaro. La viro nun en potenco estas tiu, kiu iam estis verdiktita kaj enkarcerigita kiel militkrimulo en la postmilita periodo. Ŝajnas al ni strange, ke Usono trovas sin en konsento kun tiu persono, kiu estis persekutata kaj kulpigita en la nomo de la pacamantaj nacioj de la mondo, inklude Usonon. Ĉar ni jam spertis la atombomban detruon kaj ĉiaspecajn katastrofojn de milito, ni havas en ni profunde radikitan timon je nova milito kaj multe malfidas la Kiŝi-administracion, kiu intencas, kiel ŝajnas, involvi nin en alian militon.

Ni kredas, ke amika rilato inter nacioj povas esti starigita, ne per traktato, kia tendencus akceli militan sendependigon de iu nacio, sed per

reciproka respekto por la sendependeco kaj suvereneco de ĉiu nacio, kiel ankaŭ per ekonomia kunlaboro kaj kultura interŝanĝo.

Dum la parlamenta debato, kiu sekvis la "subskribon", aperis nombro da nebulaj punktoj en la respondoj donitaj de la koncernaj ministroj kaj aliaj registaraj oficistoj al la demandoj de la opoziciaj partioj. Multaj problemoj tiel aperis unu post alia, kiuj bezonis atentan diskutadon. Pro tia kaŭzo, publika opinio komencis laŭte postuli la disigon de la parlamento antaŭ la "aprobo" de la Traktato, insistante, ke la registaro sondu la publikan opinion pri tiu ĉi gravega problemo. Pri tiu ĉi afero, la nombro de la subskriboj de la peticio sendita al la parlamento atingis la sumon de 10,000,000 — 25% de ĉiuj japanaj voĉhavantoj plenrajtaj (laŭ la *Asahi*, datita je 20 majo). La ĉefa kaŭzo de tiu ĉi publika peticio estis, ke la revizio de la Traktato ankoraŭ ne estis prezentita al la popolo en la tempo de la lasta ĝenerala elektado de 1958, kaj ke la elektita registaro donis poste nenian konsideron al la publika opinio laŭtigita de tiu tempo.

Kaj la 19-an de majo, 1960, la registaro fine uzis perfortan manovron. La reganta partio, sen ia debato kaj spite la kontraŭstaron de l' aliaj partioj, decidis la 50-tagan plilongigon de la parlamenta sesio, kies fino estis fiksita je la 26-a de majo. Tio okazis en plena sesio okazigita post kiam 500 policianoj perforte fortrenis el la parlamentejo la reprezentantojn de la opoziciaj partioj, kiuj obstrukcis la pasigon de la leĝprojekto. Kaj la sekvintan tagon (la 20-an) la registara partio per si sola "aprobis" la reviziitan Traktaton. Ni havas multan dubon, ĉu tiaj perfortaj rimedoj povas esti laŭleĝe validaj.

Kontraŭ tiaj parlamentaj procedoj leviĝis fortaj kritikoj eĉ inter la subtenantoj de la registara partio kaj ankaŭ eĉ inter tiuj, kiuj ne oponas la Traktaton mem. Laŭ enketo de publika opinio farita de la *Asahi* (dat. 2 junio); kiuj subtenis la tenigon de la registaro estis 6%, kaj kiuj malaprobis ĝin estis 50%. El la redakciaj ĉefartikoloj de la 49 ĵurnaloj apartenantaj al la Gazet-Asocio, 15 diris: "La reganta partio kaj la opoziciaj partioj, ambaŭ devas instrospekti sian konduton". 33 ĵurnaloj insistis, ke la parlamento estu disigita, aŭ ke s-ro Kiŝi eksigu. Laŭ alikategoria publika enketo de la *Asahi* (dat. 3 junio), 58% postulis, ke la Kiŝi-kabineto estu anstataŭigita per alia kaj nur 12% esprimis, ke ĝi daŭrigu sian postenon.

Ĉar la Kiŝi-kabineto ne montris pretecon aŭskulti la publikan opinion, la forta opozicio kontraŭ s-ro Kiŝi fariĝis pli vasta kaj ampleksa. En tiu tempo, multaj japanoj esprimis la opinion, ke la anoncita vizito de Prezidanto Eisenhower al Japanujo estu prokrastita, ĉar evidentis al ĉiu,

ke, sendepende, ĉu Prezidanto Eisenhower deziris tion aŭ ne, s-ro Kiŝi intencis profiti la okazon de lia vizito por plifirmigi sian politikan pozicion. Tiu ĉi lia intenco estis malkaŝita en la fakto, ke la dato de la “aprobo” estis kalkulita esti ekzakte unu monaton antaŭ la alveno de Prezidanto Eisenhower en Japanujo; tiel la aŭtomata “ratifikigo” de la Traktato okazos koincide kun la vizito de Prezidanto Eisenhower. Ĝuste en tia maloportuna tempo vizitis nian landon s-ro Hagerty, gazetserva sekretario de la usona prezidanto. Ni ege bedaŭras, ke li devis esti submetita al la malagrabra traktado ĉe Haneda Aerhaveno, Tokio.

Malgraŭ ĉio, kio okazis, la registaro ankoraŭ tute ne adoptis prirespondan rimedon por solvi la tumultan situacion. La studentaj movadoj, same kiel tiuj de popolamaso fariĝis ĉiam pli kaj pli potencaj. Nur post kiam unu studentino de la Universitato de Tokio estis mortigita en kolizio kun la polico dum la amasa manifestacio de la 15-a de junio, la Kiŝi-registaro petis al Prezidanto Eisenhower la prokraston de lia vizito al Japanujo. Ni scias, ke tia oficiala ago de registaro kontraŭas internacian etiketon, kaj sincere bedaŭras pro tio. Sed tamen, ni kredas, ke ĝi estis necesa por ke la japanoj malhelpu s-ron Kiŝi, utiligi la viziton de Prezidanto Eisenhower por antaŭenpuŝi siajn politikajn aspirojn. Efektive, multaj el tiuj, kiuj forte urĝigis la prokraston de la planita vizito, estis la japanoj por-amerikanaj, kaj ili sincere afliktis sin pro la malbonaj efikoj, kiujn la misadministracio de la Kiŝi-registaro alportus al la amikeco inter Japanujo kaj Usono.

La “socia maltrankvilo”, kiun la registaro pretekstis por peti al la Prezidanto de Usono prokrasti lian viziton ne statis tiel, kiel la Kiŝi-registaro deklaris, aŭ multaj fremdaj korespondantoj raportis. Oni publike deklaris, ke ĝin kaŭzis la perfortismo de malgranda nombro da japanoj, kiuj estas sub la influo de anti-amerikanismo aŭ internacia komunismo. Tio ne estis vera. Okazadis ĉie pacaj manifestacioj de senprecedencaj proporcioj — tra la lando. Ni deziras sciigi al vi, ke la perfortaĵo okazinta dum la “15 junio-manifestacio” estis raportata laŭ tro sensaciaj kaj ĝeneraligaj manieroj. La registaro cetere nomis ĉi tiun tutlandan pacan proteston kontraŭ la perforta pasigo de la Sekurec-Traktato — “socia maltrankvilo”. Por ni, kiuj spertas internacian amikecon per scienca interŝanĝo, estas surprizo aŭdi ĉi tian maljustan propagandon, kiu akuzas nin kvazaŭ ni estus anti-amerikanaj aŭ komunistaj.

Ni estos tre feliĉaj, se tiu ĉi letero donos al vi pli ĝustan komprenon pri la socia situacio de nia lando. Ni esperas, ke vi afablos disdoni la informojn de tiu ĉi letero al multaj el viaj amikoj. (Trad. T. N.)

El kristana revuo:

Oomoto, mondsava religio (1)

de Sakae Kobajaŝi

Ĉi tiu artikolo de s-ro Sakae Kobajaŝi estas publikigita en Vol. II, N-ro 1, 1960, de *Japanese Religions*, la kvaronjara periodaĵo de *The Christian Center for the Study of Japanese Religions*, 10 Daido-ĉo, Ŝugakuin, Sakjo-ku, Kioto. Ĉi aperis en la nomita revuo samtempe en la dulingvaj tekstoj angla kaj japana, kaj estas daŭrigota en la sekvanta numero.

La aŭtoro, s-ro Sakae Kobajaŝi estas redakcia komitatano de *Japanese Religions* kaj lektoro pri la historio de religioj ĉe Kansei Gakuin Universitato en la urbo Niŝinomija (apud Osaka). Konsiderante ke la traktaĵo pri Oomoto el la plumo de sincera kristano kaj kompetentulo pri religia studo interesos niajn legantojn, ni esp-igis ĝin kun la permeso de l' aŭtoro.

La Red.

(1)

Por la kristanoj, kiuj estas interesitaj en la studado de la tiel-nomataj “novreligioj” de Japanujo, unu sendube plej grava religio estas Oomoto¹⁾. La fakto, ke, malgraŭ sia sepdekjara historio Oomoto havas nur iom pli ol 200,000 kredantojn, surprizas nin pro la malgranda nombro, se ni komparas ĝin kun tiu de aliaj novreligioj. Ekzemple, Seiĉoo no Ie, kiu devenis de Oomoto en 1936 pretendas ke ĝi havas 2,000,000 kredantojn, dum Tenŝoo Kootai Ĵinguu Kjo, fondita de s-ino Sajo Kitamura en 1945, laŭdire havas 130,000 sekvantojn. Sed la relative plimalgranda nombro de la sekvantoj sola neniel malpliigus la gravecon de la studado pri Oomoto ne sole tial, ĉar ĉi tiu estas la patrino de pluraj pli novaj religioj, kiuj hodiaŭ estas pli-malpli influhavaj — kiel ekz-e, Sekai Kjuusei Kjo (Monda Mesianisma Religio), Seiĉoo no Ie kaj Ananai Kjo — sed ankaŭ tial, ĉar en la religiaj travivaĵoj de la Fondintino kaj la

Majstro de Oomoto, kaj en la doktrinoj formitaj de ili troviĝas multaj elementoj, kiuj estas tre proksimaj al la enhavo de La Sankta Biblio (de Kristanismo).

En Oomoto oni kredas, ke la Unusola Dio, la Kreinto de la Universo, kies nomo estas “Uŝitora no Konjin”²⁾ aŭ alinome “Kuni Toko Taĉi no Kami”³⁾, manifestiĝis pere de Fondintino Nao Deguĉi, kun la celo savi la mondon malpurigitan de malbonaj spiritoj, ke la pentofaro kaj sindona servo de homoj kiel la filoj de Dio alportos pacon kaj ordon al la homa socio, ke la Fondintino estas Johano la Baptisto, kiu baptis per akvo, kaj la Majstro — Kristo, kiu baptis per fajro. Krome, en Oomoto la koncepto pri la mondfino estas potenca, kaj Majstro O. Deguĉi havis la konscion de savanto en si mem. Kaj tamen, se oni konkludas el ĉio ĉi tio, ke Oomoto ricevis pli grandan influon de Kristanismo, ol de Budaismo aŭ Ŝintoismo, oni riskus tro hastan konkludon. Ni povus pli ĝuste diri, ke se Oomoto ricevis ian influon,



Miroku-den Preĝejo en Ajabe, fotita de ĝia malantaŭo

ĝi estas egale de Ŝintoismo, Budaismo kaj Kristanismo.

En la pasinta historio de japanaj religioj neniu religio estis tiom malkomprenata kiom Oomoto. La antaŭjuĝo pri Oomoto kiel la plej elstara tipo de "falsa religio" verŝajne nun regus ankoraŭ la koron de tiuj multaj, kiuj memoras pri ĝi nur la sensaciajn artikolojn aperintajn en la ĵurnaloj en la tempo kiam Oomoto estis persekutata dum la du okazoj, 1921 kaj 1935.

En tiu laste menciita periodo Oomoto estis terure persekutata de la tiama tronaciisma registaro, kaj samtempe, akre kritikata de la "malnovaj religioj" kiuj estas perdintaj sian freŝan vivforton kaj koruptitaj de sia tradicia aŭtoritatismo. Paradokse dirite, tio rakontas, kiom firme la instruo de Oomoto estis akceptata de popolamaso kaj kiel rapide ĝi estis disvastiĝanta kiel reala, socia potenco.

Se la kredo de religio ja povas plifirmiĝi kaj la doktrino plievolui dank' al persekutado, oni povus diri el la longdaŭra vidpunkto, ke Oomoto gajnis pli multajn spertojn kaj lecionojn valorajn, ol ĝi perdis materiajn posedaĵojn pro la multjara persekutado.

Estas mirinda fakto, ke oni komencis fari la veran, justan kaj ĝustan prezentadon de Oomoto nur depost la finiĝo de la 2-a mondmilito, kiam oni akiris unuafoje la liberecon de parolo kaj preso en la ĝusta senco de la esprimo. En tiu senco oni povas diri, ke Oomoto estas religio, kiu ĉiam ankoraŭ havas novan senton, malgraŭ ke ĝi havas la historion de sepdek jaroj. Al mi ŝajnas, ke Oomoto kiel mondsava religio certe staras nun ĉe grava turnopunkto por sia estonta disvolviĝo. Mi poste klarigos plurajn kaŭzojn, kiuj subtenas tiun mian opinion. Por ni, japanaj kristanoj, kiuj havas

apartan intereson pri la indiĝenigo de la Evangelio en tiu ĉi lando, estas ankaŭ grandega intereso scii, kiajn rimedojn Oomoto uzos por la disvastigo de sia kredo. Kvankam mia observo pri Oomoto estas limigita, mi tamen estas konvinkita, ke Oomoto estas en multaj rilatoj ia orientanto por la kristanaj preĝejoj en Japanujo.

Ĝis nun aperis kelkaj verkoj, kiuj prezentis la historion kaj la evoluon de Oomoto, sed ili pritraktis Oomoton ĉefe el la religi-sociologia vidpunkto, sen pritrakti sufiĉe la kredaron kaj instruojn. Do estas nature, ke ili nur malmulte okupiĝis en la religiaj travivaĵoj de la Fondintino kaj la Majstro. Senbezzone diri, ke la kerno de religio kuŝas en la religiaj spertoj de homo kaj en lia kredo kaj lia konvinkiĝo pri ĝi. Ĝis hodiaŭ neniu studanto krom la oomotanoj provis pritrakti la instruojn de Oomoto. La celo de mia tezo do estas pritrakti ĉefe la religiajn spertojn de la Fondintino kaj la Majstro, kune kun la doktrinoj de Oomoto, kiuj estis evoluigitaj grandparte de la Majstro.

(2)

La Fondintino de Oomoto, nomata Nao Deguĉi, naskiĝis en la familio de ĉarpentisto kiu vivis en Fukuĉijama, Kioto-Provinco, en 1837. Ŝia vivo estis la plej mizera, kiun ni povas imagi. Kiam ŝi estis dekunujara, ŝi perdis sian patron. Ŝi do fariĝis vartistineteto. En la aĝo de dudek jaroj, ŝi adoptiĝis kiel filino de la familio Deguĉi. Tiu familio tiam estis sufiĉe riĉa kaj, kiam ŝi edziniĝis, nova domo estis konstruita por la paro. Ŝia edzo, ĉarpentisto, ankaŭ estis adoptita filo de la Deguĉi-familio. Kion li alportis kun si, tio estis nemalmulta ŝuldo, kune kun tri metilernantoj, kio devigis ekstran elspezon

al la familio. Li estis denature gaja, humura, kaj ĝatis drinkadon. Ĉar li estis bonkora laŭnature, li estis facile trompata de aliaj kaj sekve de tio li ĉiujare perdadis el la posedaĵo de la familio. Finfine li devis forvendi siajn domojn kaj loĝi en ludometo. Samtempe, kion ili gajnis, tio estis nur multaj infanoj. Ok infanoj estis naskitaj, sed el ili, du filinoj fariĝis frenezaj, kaj la unua filo iam provis sinmortigi vane, forlasis la hejmon por neniam reveni. La dua filo eniris en armeon kaj batalmortis en Formoso. La malfeliĉo de la familio daŭris: la edzo estis paralizita dum tri jaroj kaj mortis. Poste, ŝi sola devis vivteni la familion per aĉetado-vendado de ĉifonoj. Ŝia vivo estis mizera.

Ŝia ĝentileco kun obeemo kaj diligenco estis rimarkinda jam de sia knabineco. Kiam ŝi estis dektrijara, ŝi havis okazon esti publike laŭdata de la provinca estro kiel unu el la tri plej bonaj kanbinoj en la provinco pro sia sindediĉa laboro por la familio. En "Kaiso Den" (La Vivo de la Fondintino) oni priskribas sian grandan fidelecon al sia edzo. Ŝi neniam plendis al sia edzo, kiu, anstataŭ subteni la familion, nur subfosadis la ekonomian vivon de la familio per sia vivado prodiga kaj indifera. Kontraŭe, ŝi faris ĉiun klopodon sinofere, por fari la edzon pli feliĉa.

En la 10-a de jan. 1892 (laŭ la luna kalendaro) ŝi subite eniris en la staton de spiritposedo. Ŝiaj parencoj pensis ke ŝi frenezigis. Ŝi mem tre afliktiĝis suspektante, ĉu ŝi estas posedita de malbona spirito. Ŝi neniam havis tian religian sperton. Sincera kaj honesta, ŝi timis, ke, se ŝi estus posedita de malbona spirito, ŝi povus korupti la publikon pro la spirito. Ŝi volis scii, kia spirito okupis ŝin. Ŝi vizitis pastrojn, kiuj

1) La religio estas vaste konata per la nomo de "Oomoto Kjo", sed la korekta nomo estas "Oomoto".

2) "Uŝitora no Kon'in" povus esti tradukita: la Ora Dio en la Nordoriento. La atributoj de tiu ĉi Dio estos detale klarigitaj poste.

3) "Kuni Toko Taĉi no Kami" estas la nomo de la Kreinto-Dio laŭ la tradiciaj libroj de Ŝintoismo, kiel "Koĝiki" (La Kroniko de Malnovaĵoj) kaj "Nihongi" (La Japano Kroniko).



Fondintino Nao Deguchi (1837-1918)

ekzorcas, aŭ elŝorĉistojn por esti ekzamenata. Estas skribite en "La Vivo de la Fondintino" ke en tiu tempo ŝi faris dialogon kun la Dio, kiu manifestis Sin al ŝi.

Ŝi demandis, "Kiu vi estas?"

"Mi estas, Li respondis, Uŝitora no Konjin (La Ora Dio en la Nordoriento)."

"Mi timas, ŝi rediris, ke vi trompas min per tia diraĵo."

"Mi estas nek vulpo, nek melo, kiuj enŝoviĝas en homojn en tranĉo. Mi estas la Dio, kiu reformos kaj rekonstruos la Mondon. La tuta Mondo ekfloros kiel la prunfloroj. La tempo revenis por la regado de Mi, la Pradio de la Mondo. Mi faros la grandan lavadon kaj grandan balaadon tra la Mondo kaj refondos la Regnon de Dio, kiu eterne daŭros en paco."

Ricevinte ĉi tiun revelacion de Dio, ŝi konvinkigis, ke ŝi devas plene obei al Lia ordono.

De post tiam ŝi renkontadis mokojn de la vilaĝanoj kaj parencoj, sed ŝi neniam ŝanceliĝis kontraŭ kia ajn persekuto aŭ suferigo, kaj sin donis al la diskonigo de la instruoj de "la Ora Dio en la Nordoriento". Ŝi laŭte anoncadis en Lia nomo, ke la Regno de Dio venis kaj la Mondo estu rekonstruita. Fine ŝiaj parencoj enfermis ŝin en ĉambreton kaj apenaŭ donis al ŝi nutraĵon. Kiam ŝia malsato estis ekstrema, la interna voĉo diris al ŝi: "Nao, suĉu vian manon, kaj vi akiros vivforton." Ŝi do suĉis siajn manplatojn kaj fingrojn kaj satigis sin per tio.

En "La Vivo de la Fondintino" oni priskribas jene, kiel ŝi komencis skribi la Diajn vortojn en la formo de "Ofudesaki (Sankta Skribo)":

Iam, la Fondintino sin turnis al Dio dirante, "Se mi daŭrigos tiel laŭtan anoncadon, oni nur prenos min por frenezulino kaj ne aŭskultos min. Kaj mi devas suferi ankaŭ korpe. Ĉu vi ne havus alian rimedon, per kiu mi povos komuniki Vian volon al la homoj?"

"Bone, diris Dio, prenu vian skribilon". Skribilo tute ne povis esti havebla en tiu ĉambreto. Eĉ se eble, estus tute senhelpe por ŝi skribi, ĉar ŝi estis analfabeto. Kiam ŝi hezitemis, denove diris Dio, "Fidu al mi, ĉar ne vi, sed mi skribos per vi!"

"Ŝi do rigardis ĉirkaŭen. Ŝi trovis najlon kuŝanta sur la planko. Apenaŭ ŝi ekprenis ĝin, ŝia mano automate ekmoviĝis kaj io skribiĝis sur kolono de la ĉambreto. Ŝi tamen ne komprenis, kion ŝi skribis tie."

Tio estis la komenco de la "Sankta Skribo" kiu de tiam (1892) ĝis ŝia morto en 1918, atingis laŭ sia amplekso 200,000 kajorojn.

En la ĉambreto ŝi estis enŝlosita dum kvardek tagoj. Unu tagon ŝia bofilo, la

edzo de ŝia unua filino, venis al ŝi. Ŝi petegis al li, ke li liberigu ŝin. "Mi liberigos vin", respondis la bofilo, "kondiĉe ke vi konsentos forvendi la domon de la Deguchi-familio kaj donos vian sigelon al la vendkontrakto". Ŝi konsentis kaj estis liberigita. Sed ŝi trovis, ke kion ŝia bofilo forvendis, tio estis ne nur la domo, sed ankaŭ ĉio en ĝi, escepte la solan objekton: muelŝtono, kiun ŝi uzadis por poluri ĉiutagan rizon.


Leginte la libron "La Vivo de la Fondintino" atente kaj objekte, mi povas aserti ke ŝi havis firman konvinkigon, ke ŝi estas elektita profeto de la "Dio en la Nordoriento" kaj ke spite al ĉia sufero kaj persekuto ŝi heroe dediĉis sin al la proklamado tiel por la mond-savado de tiu ĉi Dio kiel por la pentofaro de la homoj. Ĉu ŝia religia sperto ne estus komparebla al tiu de Amos: "Kiam la Sinjoro, la Eternulo, parolis, kiu tiam ne profetos?" (Amos 3:8).

Kiam ŝi eksciis, ke la Dio, kiu manifestis Sin al Nao, estas ne falsa dio,

sed la Dio, kiu rekonstruos la tutan mondon kaj starigos pacon kaj ordon sur tero, ŝi komence timis kaj hezitis fariĝi Lia reprezentanto. Ĉu la analfabeta Nao ne rememorigas nin pri Jeremia en Jeremia 1:6-10 kaj Jesaja en Jesaja 6:3-5?

Mi estas studanto de la historio de religioj. Senbezzone do diri, ke mi ne englutis la enhavon de "La Vivo de la Fondintino" senkritike. Kaj tamen mi konstatis, ke kio estas skribita en la libro, estas bazita sur la precizaj historiaj faktoj liveritaj de la filinoj kaj la nepinoj de la Fondintino same kiel sur la "memoraĵoj" transdonitaj de la Fondintino mem. En ĝi estas nenio provo intence religi aŭ misterigi la vivon de la Fondintino. Krome, per la persona intervjuo kun la estraranoj kaj kelkaj lokaj kredantoj de Oomoto mi konstatis, ke ilia teniĝo rilate al kredo estas tre sincera kaj lasis al mi nenian ombron da suspekto, ke ili farus trograndigon kaj propagandon, verkante tion, kion ili kredas la preciza historio de Oomoto.

(Daŭrigota)



Folio el la Revelacio de "La Ora Dio en la Nordoriento", skribita de la Fondintino, Nao Deguchi la 11-an de jan, 1904 (laŭ la luna kalendaro). En ĝi, same kiel multloke, estas skribite, ke ne nur la surtera mondo, sed la miliardoj da mondoj de la spiritoj estos ĉiuj kune unuigitaj kiel Dia Regno sub la regado de unusola Dio, sed estas avertite, ke antaŭ ol tio, okazos Krizego kiun la homaro devas travivi kaj la Krizego estos tia, ke neniu povas transvivi ĝin per forto materia, sed nur per virto Dikreda.

Allan Kardec

— Tio ĉi estas io pli ol eksterordinara — diris S-ro Fortier — vi ne nur igas tablon turniĝadi per magnetizo, sed ankaŭ povas igi ĝin paroli. Vi faras demandon kaj ĝi respondas vin.

— Tio estas io alia — rediris S-ro Rivail. — Mi ekkredos ĝin nur kiam mi vidos ĝin propraokule kaj kiam oni povos pruvi, ke tablo havas cerbon por pensi, nervojn por senti, kaj ke ĝi povas fariĝi somnambulo. Ĝis tiam, permesu al mi diri, ke mi vidas en tio ĉi nenion krom ferakonton kiu lulas nin en dormon.

Tia konversacio okazis inter S-ro Fortier, magnetizisto, kaj S-ro Rivail, instruisto kaj verkisto. La jaro estis 1854, kiam tuta Francujo — fakte tuta Eŭropo — estis zumanta pro la novaĵo: tabloj, kiuj turniĝas, saltas, dancas, eĉ respondas demandojn kaj ludas nombron da diversaj artifikoj. En la lando estis malfacile trovi familian ĉambron, kie la eksperimentoj ne estis okazigataj, kvankam la plimultaj el ili estis nur en distra humoro, kiel io simila al *jeu de salon* aŭ societa ludo.

Tio estas la unua fojo ke S-ro Rivail aŭdis pri tiu nova sensacio. Lia prudento rifuzis akcepti ĝin je ĝia reklamita valoro. Li estis viro kun la menso solide kulturita; li jam verkis multajn librojn pri la problemoj de edukado kaj havis la kutimon de scienca pensado, sen allaso de eĉ la plej malgranda ombro da fantazio. Lia imago estis enkadrita de lia malvarma, klara rezonado.

Ni volas ĉi tie rakonti, kiel S-ro Rivail (Hippolyte-Léon Denizard Rivail) fariĝis *Allan Kardec*, la granda spirita

gvidanto, aŭtoro de multaj elstaraj libroj pri la spiritisma temo, kompilanto de la granda amaso da informoj, kiuj fariĝis la ĉefparto de mirinda doktrino nova.

Hippolyte-Léon Denizard Rivail naskiĝis en Liono, la 3-an de oktobro 1804, en tradicie prestiĝa kaj respektata familio. Multaj el liaj prapatroj estis eminentaj advokatoj kaj juĝistoj.

La juna S-ro Rivail estis baldaŭ altirataj al sciencaj kaj filozofiaj temoj. Li komencis siajn studojn ĉe Liono kaj finis ilin ĉe Yverdun, Svisujo, sub la gvido de la fama Profesoro Pestalozzi, kies unu el la plej eminentaj disĉiploj li fariĝos, dediĉante sin al la disvastigo de la edukaj metodoj kreitaj de lia granda majstro. Multfoje, la juna S-ro Rivail havis la honoron transpreni sur sin la administracian kontrolon de la lernejo, kiam Prof. Pestalozzi devis forvojaĝi por fondi novajn instituciojn similajn al tiu, kiun li jam kreis ĉe Yverdun. En ĉiuj tiaj okazoj S-ro Rivail plenumis sian taskon admirinde bone. En tiu tempo li jam povis paroli kelkajn lingvojn kiel la germana, angla, itala kaj hispana, krom sia patrina lingvo. Li povis komprenigi sin ankaŭ en la nederlanda.

Denizard Rivail estis altstatura, bela juna viro kun distingiga trajto, ĝentila kaj gajhumora kun siaj amikoj. Baldaŭ post kiam li estis eksigita de la milita servo, li fondis en Parizo lernejon similan al lia kara Yverdun-instituto. Ĝin lia onklo de lia patrina flanko financis.

En rondo de siaj amikoj, kolegaj instruistoj kaj verkistoj, li renkontis



Allan Kardec (1804-1896)

junan sinjorineton, nomatan Amélie Boudet, kiu ankaŭ estis instruistino. Kiel la solfilino de bonhavaj gepatroj, ŝi estis gracia, inteligenta kaj facilradia je rideto. Kvankam ŝi estis naŭ jarojn pli aĝa ol li, ŝi efektive aspektis dek jarojn pli juna. Ili geedziĝis la 6-an de februaro, 1832.

Baldaŭ poste, la lernejo devis fermiĝi, ĉar la kompaniulo kaj onklo de S-ro Rivail perdis preskaŭ tutan sian havon en vetludo. Ĉiu el ambaŭ ricevis po 45,000 frankojn el sia komerca entrepreno likvidita. S-ro Rivail konfidis sian monon en la mano de unu sia amiko, kiu ankaŭ okupiĝis en spekulado kaj bankrotis.

Post tiu duobla malsukceso S-ro Rivail fariĝis sengroŝa kaj devis pli forte labori kun la helpo de sia edzino. Li do komencis gajni la vivrimedojn per la tasko de librotenado por tri komercaj firmoj. Tio ĉi donis al li 7,000 frankojn ĉiujare. Post longa tempo de malfacila laboro, li komencis hejme verkadi, ĝis malfrue en la nokto, librojn pri aritmetiko kaj gramatiko, krom multaj aliaj pri pli altgradaj pedagogiaj temoj. Li ankaŭ tradukis diversspecajn librojn el la lingvoj germana kaj angla. Li organizis la kursojn de Levy-Alvarès Lernejo, kien la plejparto de la junuloj

en kaj ĉirkaŭ Faubourg Saint Germain iris por lerni. En sia hejmo ĉe Rue de Sévres, li daŭre okazigis kvar privatajn kursojn pri ĥemio, fiziko, astronomio kaj anatomio, de 1835 ĝis 1840. Multaj partoprenis liajn kursojn.

Ĝis tiu tempo li jam apartenis al kelkaj sciencaj asocioj. Lia traktaĵo pri edukaj sistemoj jam estis fama tial ke ĝi akiris la unuan premion en konkurso de 1831. De 1828 ĝis 1849 li verkis multajn librojn, kaj prelegis ĉe la Polimatique-Lyceum, pri la temoj, kiuj ampleksis la fiziologion, astronomion, ĥemion kaj fizikon. Kelkaj el liaj verkoj estis adoptitaj kiel normaj legolibroj de la Universitato de Francujo. Ĉar ili vendiĝis tre bone, S-ro Rivail fine povis senti sin iom faciligita el la krizo de sia financa situacio.

Lia nomo jam tiam estis bone konata kaj respektata; liaj multaj verkoj pri edukado estis tra la lando alte taksataj laŭ sia valoro. Li povis ĝui sian vivon tial ke li jam estis sukcesa instruisto kaj aŭtoro de multaj sukcesaj libroj; sed en lia vivo estis io alia multe pli grava, kio atendis lian solidan juĝon, lian brilan inteligenton kaj lian sciencajn scion.

Ni jam vidis, kiel malvarme kaj objekte li respondis kiam li unuafoje aŭdis la mencion pri la fenomeno de la turniĝantaj tabloj. Li firme flankenlasis ĝin por posta okazo de propra vido, ne neante ĝin tamen kategorie sed petante pruvon de scienca naturo. Li deziris vidi, observi, serĉi antaŭ ol sin submeti al iu opinio. Tio estas tute natura kaj korekta teniĝo, kiun oni ĉiam devas alpreni. Tio, kion li tiam alfrontis por pritrakto, ne estis konkretaj aferoj, kiujn li povus meti sub la lensojn de mikroskopo por mezuri, pesi kaj kalkuli.

Fronte kontraŭ io, kion li neniam konis antaŭe, liaj sentoj estis iom miksitaj, sed nenio povis eskapi la atentan ekzamenon de liaj rezonaj povoj. Pri tiu

Ĉi frua fazo de sia kontaktiĝo kun la spirita mondo, li skribis poste: "Mi tiam estis ene de la ciklo de la neklarigebla fakto, kiu laŭŝajne kontraŭas la leĝojn de Naturo kaj kiun mia racio volas rifuzi akcepti. Mi antaŭe vidis aŭ observis nenion tian; la eksperimentoj faritaj en la ĉeesto de honestaj kaj sinceraj personoj igis min inklini al la ebleco de ia pure materia manifestiĝo, sed la ideo de *parolanta* tablo ne povis eniri en mian menson."

En la sekvanta jaro (1855) li renkontis unu malnovan amikon, S-ron Carlotti, kiu vaste parolis pri la mistero de la tabloj, sed S-ro Carlotti, viro el Korsikujo, estis tro entuziasma pri la tuta afero por ke S-ro Rivail akceptu lian klarigon sen sufiĉe da rezervo. S-ro Carlotti tamen estis la unua persono, kiu menciis al li la laboron de la spiritoj super tiuj faktoj. Ankoraŭ tute ne konvinkita de la vortoj de sia amiko, S-ro Rivail fariĝis ĉiam pli skeptika pri la fenomeno.

— Vi tamen fariĝos unu el la niaj — diris S-ro Carlotti.

— Mi ne povas diri, ke mi ne fariĝos — rediris S-ro Rivail.

Ni vidu kio okazos.

En majo, 1855, S-ro Rivail vizitis S-inon Roger, akompanate de S-ro Fortier, ŝia magnetizanto. Tie li renkontiĝis kun S-ro Pâtier kaj S-ino Plainemaison. Ili ankaŭ parolis pri la temo de spirita manifestiĝo, sed en tono diferenca ol tiu de la vortabunda S-ro Carlotti. S-ro Pâtier, registara oficisto, estis tre klera viro, grava kaj trankvila. Li eksponis siajn ideojn en orda kaj rigore logika maniero kaj invitis S-ron Rivail, ke li ĉeestu eksperimentojn ĉe S-ino Plainemaison, 18 Rue Grange-Batelere. Tiu tago koincidis kun mardo en majo, sed la dato ne estas menciita en la propraj kronikoj de Kardec. La horo:


la 8-a vespere.

"Tie mi vidis por la unua fojo la fenomenon de la turniĝanta tablo, kiu saltis kaj kuris ĉirkaŭe sub tiaj kondiĉoj, kiuj neniel ebligis tion. Miaj ideoj neniom ŝanĝiĝis, sed tio estis certe fakto, kiu devas havi ian kaŭzon. Mi povis vidi, ke sub tia speco de 'societa ludo' kun tiaj fenomenoj ekzistas io pli serioza. Ĝi estis la revelacio de nova leĝo, kies profundan studon mi promesis al mi."

La ŝanco por "profunda studo" venis. Ĉe la domo de S-ino Plainemaison li renkontis Ges-rojn Baudin, kiuj invitis lin ĉeesti la semajnan seancon ĉe sia hejmo. Tie S-ro Rivail fine havis la okazon esplori la problemon kiel li deziris. Li komencis sian esploron ne per teorioj. Li observadis, komparadis kaj deduktis pri la konsekvencoj. El la rezultoj li atingis la kaŭzojn. Li submetadis la faktojn al sia seninterrompa logika ĉeno, kaj neniam akceptis eksplikojn, kiu ŝajnis al li ne aplikebla por solvi la problemojn kaj demandojn sub lia analizo. Tio ĉi cetere estis lia longa vivkutimo, daŭranta de la tempo de sia knabeco super la lecionaj hejmtaskoj.

Li komprenis perfekte bone la taskon, kiun li tiam havis antaŭ si. Li sentis ke en tia fenomeno kuŝas la ŝlosilo al la mistera kaj neata problemoj pri la pasinteco kaj la estonteco. En tio kuŝas — li sentis — la solvo, kiun li serĉadis en sia vivo. Unuvorte, ĝi estis plena revolucio en siaj ideoj kaj kredoj. Li devis agi singarde kaj ne facilanime; li devis meti siajn piedojn firme sur la grundo de realeco, ne donante sin al nuraj idealismo kaj fantazio, alie li estus forportitaj al fatalaj eraroj.

"Unu el la komencaj atingoj de mia observado — diradis poste Allan Kardec — estis ke la spiritoj, estante ne aliaj ol homaj animoj, ne havas la superegan



Maldekstra: Wayfarers' Chapel de la Swedenborg-ismo, okcidente de Los Angeles. Tiu ĉi konstruaĵo tuta el vitro estis elfarita antaŭ 10 jaroj, kiel parto de la pliampleksa konstruopiano ankoraŭ efektiviĝota. Dekstra: Akrobataĵo de baleno en la amuzejo Marineland, okcidente de Los Angeles. Fotoj de E. Ito

saĝon, nek la superegan scion; ke ilia scio estas limigita al ilia evolugrado kaj ke ilia opinio ne povas esti pli altvalora ol ĉiu alia persona opinio".

Tiu ĉi sinteno savis lin de multaj gravaj eraroj tial, ke ĝi detenis lin de trofrua formulado de teorioj surbaze de la opinio de unu aŭ pluraj spiritoj. Tio ĉi estas tre grava kaj restas vera tra la tuta historio de la psika esploro ĝis niaj tagoj.

Prenu reenkarnejon, ekzemple. Estas fakto, ke en la kadro mem de la internacia spiritista movado troviĝas diferencaj opinioj pri la afero. Vasta grupo de unu flanko asertas, ke reenkarnejo estas ne nur fakto, sed filozofia kaj morala neceso. Alia grupo de spiritistoj ne kredas la reenkarnejon. Ni povus nomi ankoraŭ trian grupon, kiu tute ne

okupiĝas en tia temo, lasante ĝin al la persona decido de ĉiu. Kiam niaj kontraŭuloj komentas pri tio, ili citas, ke eĉ la spiritoj jam liberiĝintaj de la fizika korpo ne ĉiuj interkonsentas pri reenkarnejo. Sed se ili ne povas interkonsenti, tio estas tute natura, ĉar ili (la spiritoj) ankoraŭ havas preskaŭ la samajn antaŭjuĝojn kaj konvinkojn, kiajn ili havis kiel la karnuloj. Vi ne povas fariĝi geniulo plena de saĝo, nur tial ĉar vi forlasis vian pereeman materialan korpon sub la grundo. Jen kial la karnohavaj spiritoj, kiuj ne kredas je reenkarnejo emas daŭrigi la vivon senkredan je reenkarnejo ankaŭ en la astra mondo, se, aŭ ĝis, io konvinkos ilin alimaniere. (*Daŭrigota*)

Trad. D. R.

Kacuŝika Hokusaj (1760-1849)

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis HOKUSAJ, la protagonisto de japana belarto en okcidenta mondo. Ĉi-jare memorigos lin Monda Packonsilantaro multlande.

Atendante, ke ankaŭ al OOMOTO konvenos mencii tiun eminentulon, mi almetas tradukartikolon skribitan de Lubomír Hájek: KACUŜIKA HOKUSAJ (1760-1849). D-ro Hájek estas membro de l' Orienta instituto de Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj en Praha.

Jana Čichová, Praha

Japanaj insuloj en 17-a ĝis 19-a jarcentoj estis scenejo de streĉa interlukto de du klasoj. Nobelaro kaj soldatoj gardis siajn privilegiojn sociajn kaj politikan hegemonion, dum senrajta klaso burĝa — komercistoj, diversmetiaj entreprenistoj — la malalte staranta socitavolo, por si almitadis plenpotencon ekonomian. La ambicion je gvidposteno en socia hierarĥio de Japanujo la supreniĝanta klaso esprimis per propra, t.n. "plebana kulturo". Plej tipa manifesto de ĉikulturo en belarto fariĝis la famekonataj japanaj gravuraĵoj.

En menciita periodo de tri jarcentoj ĉe plebanaj pentrolernejoj finstudis dekoj da virtuozaĵ gravuristoj, kies renomo ĝis hodiaŭ eĉiĝas mondfamece. Hazarde Eŭropo plej frue konatiĝis kun la nomo de KACUŜIKA HOKUSAJ, kies kreaĵoj ĉi tie famiĝis antaŭ cent jaroj. Liaj land-pentraĵoj kun dekoj da diversaj rigardoj al monto Fuji, la spritaj skizoj de homoj kaj bestoj en mil situacioj famigis lin kiel virtuozan pentriston kaj entuziasmigis plurajn generaciojn de eŭropaj artistoj. Lia ducenta naskiĝdatreveno ĉi-jare plenrajte memoriĝas en tuta mondo.

Kacuŝika Hokusaj naskiĝis jare 1760 en antaŭurbo de Edo (hodiaŭ Tokio) en malriĉa Kaŭamura-familio, sed baldaŭ

estis adoptita de spegulpoluristo Naka-ĝima. Lia propra nomo estis Tokitaro, kaj la nomo Kacuŝika Hokusaj — nur unu el artistaj pseŭdonimoj, da kiuj li dum sia vivo ŝanĝis pli multe ol dudek kvin. En junaĝo li ankaŭ spertis ne unu okupon: kiel komizo en librovendejo, sendaŭportisto, stratvendanto de kalendaroj, detalisto en piprovendo, vagema pentranto de budaanaj standardoj. Plej longtempe asistis ĉe lignoskulptisto de kliŝoj, kie li laboris kvar jarojn. Dufoje edziĝinte li havis kelke da infanoj, kiuj kaŭzis multnombrajn premzorgojn; plej ofte tamen unu el liaj nepoj, pro kies financoperacioj Hokusaj bankrotis, kaj dum pluraj jaroj devis kaŝi sin antaŭ kreditoroj sub falsa nomo. Dum sia vivo li loĝis en 93 diversaj ludomoj. Kiam li estis 78-jaraĝa, brulruiniĝis lia 80-a loĝejo kun tuta posedaĵo da manuskriptoj kaj pentraĵoj. Tion li komentis jene: "Kiam mi surmondiĝis, mi posedis nemulton". Jare 1849 li mortis 90-jaraĝa — kaj posedis ne pli multon, ĉar malriĉeco estis lia fidela amiko. Sed Hokusaj neniam perdis bonhumoron kaj en sia lasta letero al amiko skribis: "Reĝo de la infero estas jam tro maljuna kaj intencante pensiigi li konstruis ĉarman kampardometon kaj invitis min en tiu nova dometo iom



Unu el la *Fuji Sanjuurokkei* aŭ Tridek-Ses Vidaĵoj de Monto Fuji

pentri. Mi luprenos ĉambreton je angulo de l' inferstrato kunportinte ĉiujn miajn desegnojn. Se vi iam preteriros, bonvolu min tie viziti."

Sed la sublimo de Hokusaj-vivo speguliĝas en lia ekzempla rilato al belarto. Videble li apartenis al tiuj artistoj, por kiuj la kreado signifas fatan obseditecon. Li mem konsciis tion, ĉar en longa vico da Hokusaj-pseŭdonimoj kiel lasta estas la subskribo: Gakjō Rōjin, Manĝi-Maljunulo pentrad-obsedita.

Tiu ĉi obsediteco pelis lin al senmezure intensa kreado, kies rezulto estis pli multe ol 40.000 pentraĵoj (ne kalkulante preparaskizojn). Ĝi pelis al novaj kaj novaj eksperimentoj, al konkera provado en ĉiuj ĝenroj kaj pentro-stiloj, kiuj aperis en lia horizonto; kaj li akceptadis kian ajn taskon, neniun li konsideris maldigna, eĉ ne ian pentro-ĝonglaĵon. Videbliĝas, ke Hokusaj la pentrarton ne manipulis kiel misteron aŭ ceremonion; konsiderante ĝin vivo-konsistaĵo li per tuta fortostreĉo celadis

al plej alta belarto. Precipe dum lastaj tridek jaroj de la vivo, inter 60-a kaj 90-a jaraĝo, lia pentrarto ĉiam pli multe intensiĝadis. Hokusaj mem en sia 75-a jaraĝo diris: "Mi supozas, ke ĝis mia 80-a jaraĝo ankoraŭ mi faros ian progreson. En 90-a jaro eble mi trafenos misteron de aĵoj.... kaj kiam mi estos 110-jaraĝa, ĉio kion mi pentros, vidiĝos kvazaŭ vivanta".

Sed eĉ en sia 80-a jaro li ne estis kontenta pri si mem. Lia filino Oeĵ rakontas, kiel ŝi trovis lin ploranta super tabureto "ke malgraŭ la studado kaj penlaboro li ne ellernis kompreni la aĵojn kiaj ili ververe estas". Ankoraŭ mortante li lastfoje dirmanifestis la deziron al belarto doni ĉion al ĝi apartenan: "Se la ĉielo al mi donacus ankoraŭ dek aŭ almenaŭ kvin jarojn, mi eblus fariĝi granda pentristo". Oni ja konsentus — kun malgranda korektaĵo — ke tiam li fariĝus ankoraŭ pli granda artisto ol kia li jam estis.

El "Lidová Demokracie" 33/1959
esperantigis Jana Čichová




21.23 majo en Chicago. Gastiĝis ĉe ges-roj Holland. Laŭ ilia afabla konduko vizitis la belegan Universalan Bahaan Templon sur la bordo de Lago Michigan. La foto montras s-ron Roj Holland, instruisto de gimnazio kaj s-inon Doroteo Holland antaŭ ilia domo.



24.28 majo en Los Angeles. La bildo montras ges-rojn Chomette kaj familianojn de s-ro K. Katagi, kiuj venis al la aviadejo por akcepti s-ron Itoo. Dum la restado en la urbo s-ro Itoo gastigis sinsekve ĉe la hejmo de s-ro C. Chomette, kiu proponis la gastigon de s-ro Itoo jam antaŭ lia forveturo de Japanujo kaj ĉe s-ro Katagi, la nevo de s-ro Itoo, kiun li revidis post 30 jaroj.


29.30 majo en Santa Monica. Laŭ la afabla konduko de s-ro C. Chomette vizitis esp-istan kunvenon en Santa Monica, kiun ĉeestis 20 ges-anoj. Tranoktis ĉe la hejmo de d-ro C. R. Witt, dentisto. La foto montras ges-rojn Witt ĉe la balkono.



1.2 junio en Hollywood. Gastigis ĉe la hejmo de s-ro J. R. Scherer (vd. la bildon), prez. de la esp-ista klubo kaj la aŭtoro de "Ĉirkaŭ la Mondon per Esp". Antaŭ 30 jaroj, kiam li vizitis la Centron de Oomoto, Kameoka, s-ro Itoo lin akceptis kaj interpretis por li.



5.6 junio en San Diego. Gastigis ĉe la hejmo de ges-roj Helmuth. Laŭ ilia aranĝo s-ro Itoo faris prelegon ĉe la esp-ista kunveno kaj intervjuon en la radiostacio. La foto montras de maldekstre: s-inon H Mukai, japanino enmigrinta el najbara vilaĝo de s-ro Itoo, s-inon B. Helmuth kaj s-ron F. E. Helmuth, domkonstruisto.



7.10 junio en San Francisco. Gastigis ĉe ges-roj Schulze. La vojaĝo de s-ro Itoo en Kanado kaj Usono ĉefe ŝuldis al la afabla kaj bonega aranĝo de s-ino Cathy Schulze. La bildo montras de maldekstre: s-ron Itoo, s-ron Bill Schulze, s-inon C. Schulze kaj s-anon D. R. Metzler malantaŭ la domo de ges-roj Schulze. 11.12 gastigis ĉe S-ro W. Walker kaj S-ino Walker, kiu tradukis la prelegon en Mill Valley.



13 junio en Sacramento. Oni havis por s-ro Itoo komunan vespermanĝon de lokaj ges-anoj, kie s-ro Itoo faris prelegon, la plej lastan el ĉiuj 180 paroladoj, kiujn li faris dum sia unujara mondvojaĝo. Ĉi tie ankaŭ s-ino Walker interpretis.

17 junio en Los Angeles. Je la 2-a posttagmeze s-ro Itoo enŝipiĝis en la japana ŝipo Ŝizuokamaru por reveni al la hejmlando. La foto montras de maldekstre: s-ron C. Chomette, s-ron Itoo, s-inon Chomette kaj ges-rojn Joŝimoto en la ŝipo. Fotografis s-ro I. Harada, delegito de Oomoto al Meksikio (vd. p. 119).



Elkoraĵo Dankon !

Tre estimataj gesamideanoj!

Fine mi revenis hejmen la 3-an de julio, post preskaŭ unujara vojaĝo en Eŭropo kaj Norda Ameriko. Nun antaŭ ĉio mi esprimas mian elkoraĵon dankon pro la afableco kaj helpemo, kiujn vi tiel senrezerve montris al mi okaze de mia vizito.

Kiel feliĉa mi estis ĉiutage en la daŭro de la tuta vojaĝo! Kiel bonkoraj por mi estis la Esperantistoj en plej diversaj landoj, kiujn mi vizitis! Diferenco de koloro, religio, ideologio aŭ reĝimo tute ne malhelpis, ke mi inter Esperantistoj ĉiam sentis min hejme, eĉ pli ol hejme! Nun en miaj fermitaj okuloj mi vidas unu post alia la karajn gesamideanojn, kun kiuj mi konatiĝis en la ĵus vizititaj 150 urboj de 22 landoj. Jes, ĵus—ĉar eĉ la plej frue vizititaj restas en mia memoro tiel freŝe, kiel hieraŭ.

Dank' al via helpo mi vidis kaj lernis multon. Dank' al via kunlaboro mi povis eĉ fari multon. Certe, 180 prelegoj, el kiuj 100 estis

tradukitaj entute en 14 nacilingvojn, estas ja pli ol mi povis esperi.

Esperanto montris al mi mirindan taŭgecon, ĝiaj adeptoj mirindan solidarecon. Mi sentis per mia tuta korpo, ke Esperantujo fartas bone, vivas vigle kaj ke la movado faras potencon progreson ĝenerale, eĉ se en kelkaj lokoj la stato momente montriĝas ne tiel bona. Esperanto venkos nepre, pli malpli frue, kaj tio dependas sole de nia energia kaj solidara laboro. Esperanto venkas jam nun, kaj la venkon pligrandigos, certigos, definitivigos ja ni mem.

Baldaŭ en Aŭgusto, okaze de la Japana Esperanto-Kongreso, ni decidis la inviton de U.K. Ni faros nian plejebelon por sukcesigi la epokfaran eventon—unuafaja U.K. en la Oriento, kiu tre verŝajne okazos en la jaro 1965. Do, karaj gesamideanoj, denove elkoraĵon dankojn kaj ĝis revido sub la monto Fuji!

Sincere Via

Eizo Ito

Ekskurso al la Akvofaloj de l'Iguazú (Argentino)

Unu el la plej famkonataj miregindaĵoj de la naturo en Argentino estas la akvofaloj de l'Iguazú, kiuj kuŝas en la provinco Misiones, en la plej nordorienta angulo de la lando.

Ĉar tiu regiono estas subtropika, oni ĝenerale vizitas ĝin vintre. Tamen, iun tagon dum plena somero mi decidis vojaĝi tien, spitante la varman veteron.

Mi iris per omnibuso de Córdoba (urbo kie mi loĝas) al Santa Fé, kaj per fervojo de Santa Fé al Resistencia, ĉefurbo de la provinco Chaco. Poste mi iris al haveno Barranqueras, kie mi enŝipiĝis en granda pramo kaj trairis la riveron Paraná ĝis Corrientes.

De tie ĉi mi daŭrigis la vojaĝon al Posadas surŝipe. Dum tiu 27-hora veturado mi admiris la larĝan riverregon Paraná, kiu limigas du landojn: dekstre estas Argentino kaj maldekstre Paragvajo. La du riverbordoj estas kovritaj de densa arbaro.

Nia ŝipo haltis en diversaj havenetoj je harmoniaj gvaranaj¹⁾ nomoj: Itati, Iapapé, Ita Ibaté, k. t. p.

En Posadas, ĉefurbo de la provinco Misiones, mi devis resti unu semajnon. Mi vizitis la enlandon (Cerro Corá kaj aliaj pitoreskaj urbetoj); ankaŭ la ruinaĵojn de la Jezuitaj Misioj, en San Ignacio.

Trairinte la riveron Paraná, mi iris al Villa Encarnación, beleta paragvaja vilaĝo, kiu staras antaŭ Posadas. Fine, mi enŝipiĝis por iri al Puerto Aguirre.

La rivero Alta Paraná mallarĝiĝas iom post iom. La ŝipo, kiu devas barakti kontraŭ la fluo, antaŭeniras malrapide. Ni ne povas vidi simiojn sur la arboj de la bordoj nek "yacarés"²⁾ dormantaj sur

la sablo, ĉar la akvokvanto de la rivero multe kreskis kaj tion ne ŝatas tiuj du bestoj.

Post 36-hora veturado, ni alvenis al la enfluejo de l'Iguazú en la riveron Paraná. Norde, ni vidas kojnon de brazila teritorio, kun monolito; sude, ni vidas alian monoliton sur la argentina grundo.

La panoramo estas belega. Je 2 kilometroj staras plaĉa konstruaĵo de la Direkcio de Naciaj Parkoj. Ne estas haveno nek elŝipiĝejo; ni elŝipiĝas senpere sur la riverbordon.

La omnibuso de la hotelo Iguazú atendas la pasaĝerojn. En duonhoron ni trairas la 20 kilometrojn de distanco kaj ni alvenas nokte al la hotelo. Oni ne povas vidi la akvofalojn sed oni aŭdas ilian potencon bruegon.

La tri sekvantajn tagojn ni faris ekskursojn por vidi la vidindaĵojn. La akvofaloj ampleksas 2.700 metrojn je longeco; ilia alteco atingas 80 metrojn en kelkaj lokoj.

Ni vizitis la akvofalojn "La du fratinoj", "Bozzetti", "San Martín", "Ramírez", "Adamo kaj Evo", k. t. p. Ties akvoj falintaj formas la brakon San Martín, kiu enfluas en Malsupran Iguazú-on.

Por bone vidi la Diablan Fendegon (Garganta del Diablo) ni iras per omnibuso ĝis la "Haveno de la boatoj". Tie ni enŝipiĝas en boato kaj ni trairas la riveron Supra Iguazú, lerte gviditaj de la "baqueano".³⁾ La boatisto kaj la "baqueano" antaŭenirigas la boaton malrapide kaj zorgeme. Ofte ili devas puŝi per la kreskaĵoj, kiuj sin trovas sur la

insuletoj de la rivero. La plej eta senatento farus, ke la fluo fortrenu la boaton kaj abismo 80-metra englutu nin ĉiujn.

Fine, ni alvenas al la bordo de l'profundegaĵo. Prezentiĝas al ni la plej majesta kaj impona spektaklo, kiun homo povas vidi sur la planedo. Grandegaj masoj da akvo, kiuj alvenas de ĉie, malaperas en la abismon farante teruran bruegon. En la fundo ni vidas la Diablan Fendegon iom vualita de la akveroj, kiuj invadas la ĉirkaŭaĵojn.

Pli malproksime ni ekvidas la riveron Malsupra Iguazú, kiu kolektas la tutan akvon de la Diabla Fendego.

Multajn horojn ni restas tie kaj rigardadas tiun neforgeseblan pejzaĝon. La fotograf- kaj filmaĉinoj funkcias seninterrompe. Fine ni revenas.

La akvofaloj de l'Iguazú estas argentinaj (escepte tri, kiuj apartenas al Brazilo); sed la tutan aron oni nur povas bone vidi de la brazila riverbordo. Tial ni devas fari alian ekskurson, ankaŭ per boato, ĝis nia najbarlanda bordo.

Krom la akvofaloj estas aliaj vidindaĵoj en tiu regiono: densaj arbaroj, riveroj kaj riveretoj, k. t. p. La tuto

konsistigas la Nacian Parkon de l'Iguazú.

Malfeliĉe estas iu besteto, speco de tre malgranda muŝo, kiu tre ĝenas la turistojn per ĝia doloriga piko: ĝi nomiĝas "mbarigu".

Ni devas ĉiumomente ŝmiri niajn manojn kaj vizaĝon per iu fluidaĵo nomita "citronela" (elparolu: "sitronela"), kiu forigas tiun muŝon.

En la hotelo kuŝas granda libro, kie la vizitantoj registras siajn pensaĵojn. Mi foliumis ĝin. La enskriboj estas en la plej diversaj lingvoj, eĉ orientaj. Mi skribis kelkajn liniojn en Esperanto, kaj la hotelestro diris al mi ke ili estas la unuaj en tiu lingvo.

Ĉion oni observas laŭ la okuloj kiujn oni havas. Inĝenieroj kaj aliaj teknikistoj vizitis ankaŭ la akvofalojn de l'Iguazú. Kiel rezulto ili faris la projekton profiti tiun grandegan hidraŭlikan forton por produkti elektron.

Kompreneble, se oni tion efektivigus, grandajn materialajn utilojn havus nia lando. Sed la majesta beleco de la akvofaloj suferus sendube gravan baton.

VORTOKLALIGO

¹⁾ La indiĝenoj de la nordorienta parto de Argentino parolas gvaranan lingvon, same kiel tiuj de Paragvajo kaj proksimaĵoj de Brazilo.

²⁾ "Yacaré" (elparolu: "jakaré") estas kvarpieda danĝera rampulo simila al krokodilo sed malpli granda.

³⁾ "Baqueano" (elparolu: "bakeano") estas sperta homo, kiu bone konas la regionon kaj lerte gvidas la vojaĝantojn kaj turistojn.

Faldfolio: "Oomoto kaj UHA"

senpage liveras Oomoto

*

"Opinio pri la ata-ita problemoj"

de T. Mikami havebla ĉe Oomoto.
kontraŭ 2 resp. kuponoj por 1 ekz!

Recenzo

★ LINGVO KAJ VIVO de Gaston Waringhien. Esperantologiaj eseoj. Kovrilo de John Hartley. Busto de Zamenhof, farita de la ĉeĥa skulptisto Em. Kodet. Eld. de STAFETO — Eldonisto, J. Régulo, La Laguno, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, 1959. 452 paĝoj (16×22 cm). Prezo: broŝurita \$3.40, tolbindita \$4.00 aŭ egalvaloro plus sendkostoj.

Konsistas el tri partoj: I NIA LINGVO, kiu entenas dokumentojn pri la praformoj de Esperanto kun la aŭtora komento kaj orientado, II NIAJ PROBLEMOJ, kiu pritraktas gramatikajn kaj aliajn lingvajn demandojn de Esp. kun la aŭtoraj solvoj kaj sugestioj, III NIAJ PERSPEKTIVOJ, kiu pritraktas kelkajn aktualajn problemojn de la internacia kompreniĝado kaj montras la nevenkeblan superecon de Esperanto super ĉiuj ĝiaj konkurantoj. Ĝi estas ne nura kolekto, sed mozaiko da eseoj, kiun povis fari nur tia persono, en kiu harmonie sidas literaturisto, verkisto kaj lingvisto. Leginte ĉiujn paĝojn — de kovrilo ĝis kovrilo — de tiu ĉi admirinda verko, mi trovas min nekapabla pli bone esprimi miajn pensojn, ol citi kaj substreki la vortojn de Stafeto, presitajn sur la kovrilfaldo:

“Sen troigo oni povas aserti, ke la nun prezentataj *Esperantologiaj Eseoj* superas ĉion ĝisdatan de la aŭtoro. Efektive, tiu ĉi volumo impresos al ĉiu konscia homo kiel la plej eksterordinara verko publikigita en esperanto. Ekster-

ordinara, en la strikta difino de la vorto: ekster la normoj de aliaj esperantologiaj libroj.

“*Lingvo kaj Vivo* estas sumo pri esperanto rigardata kiel vivanta lingvo kaj socia fenomeno. Neniam ion pli densan, pli kompletan, pli sciencan, pli filozofie sentitan oni skribis — kaj en pli harmonia flua formo — pri tiu fenomeno, kiun la entuziasmoplenaj esperantistoj nomas ‘sia kara lingvo’. Kaj kio donas ankoraŭ pli da aŭtoritateco al tiu monumento, tio estas la fakto, ke kuniĝas plej intime kaj konvinke en nia aŭtoro samtempaj fakaj lingvistikaj konoj de profesulo kaj plej profunda, science studita kompreno de la zamenhofaj verkaro kaj spirito.”

Multaj vortoj de l’ aŭtoro estas klerigaj, pensigaj kaj idevekaj, kvankam ne mankas ankaŭ la kritikindaj. Por resumi ilin ne estas loko ĉi tie, kaj tamen, kredeble mi revenos al ili en la estonteco. Mi do volas ĉi tie nur substreki unu aspekton de la problemoj de Neologismoj. Waringhien akcentas la bezonon de enkonduko de la ĉiutagaj neologismoj de konkretaĵoj kaj la literaturaj de abstraktaĵoj. Sed eĉ por abstraktaĵoj mi sentas je ĉiu paŝo pli grandan mankon de la ĉiutagaj. En nia konversacio, mi neniam havas okazon (por citi angle, pro konveneco) esti *disappointed*, senti *relaxed*, *relieved*. Pro manko de tiaj kaj aliaj adekvataj esprimoj, mi iel ĉirkaŭfrazumas. Malgraŭ la ŝajne pompa florado de nia literaturo kaj malgraŭ la efektive altgrada kaj solida enhavo de tiu ĉi verko, ni momente pripensu, kiel dirus la mal-amiko de Esp-o, se ili hazarde legus (p. 246): “Sed kiam oni povas vivi tiun lingvon (kiel interalie en la hejmoj, kie la geedzoj povas interkompreniĝi nur per Esp-o), kaj kiam oni ekrimarkas,

ekz-e, ke ni ne posedas registritan kaj tradician rimedon por esprimi la agon ekkapti ion falintan kaj levi ĝin de la planko, tiam vere oni sentas, kiom ankoraŭ mankas al nia lingvo por ke ĝi estu kompleta!” impresiĝis, ke tiu ĉiutaga flanko postrestas la evoluon de la belliteratura.

Teruo Mikami

★ ŜTUPOJ SEN NOMO de Balduo Ragnarsson. Prologo de J. Régulo Pérez. Dekoracioj de Pablo Picasso. Kovrilo de John Hartley. Vinjeto de Mads Stage. *Belartaj Kajeroj 1*, eld. de Stafeto (vd. supre), 1959. 128 paĝoj (19×12 cm). Prezo: \$1.00.

★ PINTA KRAJONO de Reto Rossetti. Antaŭvortoj de Geraldo Mattos. Dekoracioj de Paul Klee. Kovrilo de John Hartley. Vinjeto de Mads Stage. *Belartaj Kajeroj 2*, eld. de Stafeto, 1959. Paĝoj 128 (19×12 cm). Prezo: \$1.00

Tiuj ĉi estas la du unuaj volumoj de la nova serio BELARTAJ KAJEROJ, per kiu Stafeto aspiras diskonigi la poemojn, novelojn, dramojn kaj eseojn de la novaj kaj malnovaj talentoj, alterne. La prestipo uzata en tiu ĉi serio estas nova; aparte la “st” ligita per arka superponto, belorname kontraŭpezas la esp-ajn supersignojn.

*

Eble la poezio de Ragnarsson ne estus tro novecisma, se ni konsideras la fakton, ke kelkaj nacilingvaj poetoj klopodas unue detrui la tutan sencon, kiun la konvencia uzado de lingvo povas havi kaj tiel krei al si novan formon. Tiaj reformaj provoj en la pasinteco alportis al ni la skolojn de futurismo, dadaismo, superrealismo kaj ekzistencialismo.

Sed por laiko, kiu ĉiam dividas la poezion en du grupojn: unu de la

“kompreneblaj” kaj alia de la “nekompreneblaj”, sufiĉe multaj poemoj de Ragnarsson apartenus al la dua grupo. Tamen, la “kompreneblo” ne povas esti la normo de poezia aprecado.

En la Prologo de tiu ĉi poemaro, R. Pérez skribas, “Kio distingas arton de tio, kio ne estas arto, tio estas la konscia volforto — foje eĉ sovaĝa volforto — *reformi*, kiun alfrontas la homo ĉe ĉiu artkrea problemoj”. Neniu kontestus tiun diron, sed mi konsentas ne tute kiam li diras la samon jene: “Kio distingas arton de subarto, tio ne estas la rezultaĵo, sed la debutintenco”. Mi opinias, ke sen atingi de estetikaj rezultaĵoj, la debutintenco estus vana, kiel ajn forta kaj vigla ĝi estus. Alivorte, nur la rezultaĵoj povas aŭ ne povas pravigi la debutintencon. Rilate tion, mi eĉ volas klini mian oreilon al la simplaj vortoj de K. Kalocsaj, cititaj en la Prologo: “Ĉiu rimedo en la versoj devas servi du aferojn: kiel eble plej klaran prezenton de penso kaj kiel eble plej intensivan elvokon de sento. Estas kompreneble, ke ĉio maladekvata malhelpas ĉi ĉion.”

Por esti sincera, mi konfesas, ke mi ne povis kunsenti la iom tro nigrajn sentojn de l’ aŭtoro. Tia kritiko, mi scias, estas senseca, ĉar mi ie legis, ke, kiam poeto Ezra Pound staris ĉe la kortumo, unu lia juĝisto deklaris lin “nekuraceble malsana” sed “sufiĉe sendanĝera” por ke li foriru libera: ĉe tio, Pound mem komentis, “Ĉiu homo, kiu povus vivi en Ameriko, estas freneza”, kaj li preparis sin por forveturi al Italujo. Unuj tre povas esti frenezaj por la aliaj, kaj inverse. Per tia iom cinika komento pri la unua poemaro de tiu ĉi serio, mi esperas, ke la aŭtoro tamen trovos varman akcepton, al si meritan.

*
La dua estas la poemaro de Reto Rossetti, lingvo-artisto, kies talenta kuplita kun plum-lerteco mirfrapas nin ofte. Tio montriĝas ankaŭ en la nuna volumo per poemoj anagramaj kaj vort-ludaj, kvazaŭ daŭrigitaj el lia prozo "El la Maniko". Novan ĝuon donas al ni ekz-e lia prezento de 'literatura konkurso', en kiu li unue tradukas la poemon de Arthur Hugh Clough (1819-1861), *Say not the struggle naught availeth* (Ne diru, ke l' batal' ne helpas), kaj de ĝi verkas kvin variantojn laŭ la nomo kaj stilo de ĉiu el niaj kvin poetoj de li elektitaj. Tio ne estas travestio, sed la avatara de la kvin koncernaj poetoj, per kiu la aŭtoro originale verkas la variaĵojn kvazaŭ iliajn. Mi ne scias kiel juĝus mem la imititaj poetoj, sed mi admiras la ne facile imiteblan mult-flankecon de la poeto, trovante en ĉiu peco ion multe pli ol la aplaŭdinto de vodevila voĉimitado.

Troviĝas ankaŭ fablaj poemoj. Ankaŭ *La Jubilea Eposo* kiu estas la ĝisdata historio de Esp-o en verva kaj patosa poemo. (Mi rimarkigas, ke la "Kroniko Japano" — citita sur p. 93 — estas trivoluma kaj eldonita en la antaŭmilita tempo). Ankaŭ *Mestizo de la Mondo*, kiu donas al ĉiu la maloftan okazon amuzi sin momente rigardante la *homon* metitan kvazaŭ en menaĝeria kaĝo kaj observatan kvazaŭ el la okulo de la homosaĝa *simio*.

La ĝenerala tono de la poemoj de Rossetti estas sprita kaj humura. Sed ne ĉiuj estas tiaj, kompreneble. Sufiĉas citi kelkajn unuajn versojn el *Memore al Cezaro Rossetti*:

La pantero de l' morto
falĉis per ŝtal-unga bato
kaj malaperis mia frato.
La homoj vidis,

kiel fulme arkis
ĝia pied',
sed
ne rimarkis,
ke ĝi elŝiris mian ventron.

Notoj kaj Glosoj kompletigas la verkon. (En la glosoj mankas *mutilo*, *torporo* ktp., dum pluraj en ĝi estas tiuj jam registritaj en la Supl. de P. V.) Mi esperas, ke oni multe ĝuos la rafinitan lingvaĵon de la poeto.

T. M.

★ ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ, kompilita de Manuel de Seabra, kun tradukoj de 8 samideanoj. Eldonita de Grupo de Admirantoj de Zamenhof, por memori lian centjaron, Lisboa, 1959. 215 paĝoj kun glosoj (12,5 x 20 cm.). Prezo ne menciita.

Jen estas nova briko aldonita de portugala samideanoj en la Jubilea Jrao de Esp. Tiu ĉi libro malfermis al mi unufoje la pordon al portugala literaturo.

Traleĝinte 14 rakontojn de malsamaj verkistoj, mi trovis ilian seriozan sintenon al la literaturo, kion jam la kompilinto resumas en la antaŭparolo: "Literaturo estas la spegulo de l' popoloj. Ĝi reflektas, tra universalaj trajtoj, la problemojn kaj cirkonstancojn de ĉiu epoko rilate al la homa situacio en la mondo...ili faras la historion, spite de ĉiuj kontraŭstaroj kaj tiranecoj." Vere, la aŭtoroj celas esplori la kernon de humanismo kaj per tio, kaj nun en la esp-a vesto jam transiris la landlimojn de Portugalujo.

El ĉiuj 14 rakontoj plej impresis min: "Noktidoj" (Domingos Monteiro) kaj "La Negro Saul" (Manuel Mendes). La temoj pritraktitaj en la du rakontoj estas malsamaj — la unua pri teda junulo kiu trovas en nokto sian

S-ro Ikuo Harada delegita al Meksikio

La lastan aŭtunon s-ro S. Usui, filiestro de Oomoto en Meksiko, Meksikio, vizitis nian Centron en Ajabe kaj Kameoka por ĉeesti la Aŭtunan Feston de Oomoto, kaj post unu-monata restado ĉe la Centro li kun refreŝigita kredo reiris al Meksikio. Komence de la nuna jaro li en la nomo de la tiea oomotanaro petis al la Centro la alsendon de misiisto por pli vigligi la agadon.

Responde al tio, la Oomoto-Centro decidis delegi s-ron Ikuo Harada, 37-jara laboranto ĉe la Centro.

La 25-an de majo s-ro Harada forflugis de Japanujo. Survoje li vizitis Honolulu, Vancouver, San Francisco, Los Angeles kaj San Diego por renkontiĝi kun tieaj amikoj de Oomoto. Meze de junio, en San Francisco li povis manpremi kun s-ro E. Ito post unu jaro. S-ro Harada restadis en Los Angeles unu monaton kaj poste forveturis al Meksikio. Tie li agados unu-du jarojn.



vivsignifon; la alia pri la sorto de la nigrula sklavo Saul. En ambaŭ rakontoj fluas per novrealisma stilo, akra kritik-spirito kontraŭ la civilizita homo.

Aliaj rakontoj ankaŭ montras diversajn esploradojn de homa vivo. "Nenio Grava" (Manuel do Nascimento) ĵetas al ni la problemon de laborista vivo. "Animo de Antikva Domo" (Natercia Freire, poetino) prezentas komplikajn problemojn de hejmo kaj homa rilato, ktp. Ĉar la medio de la rakontoj ĝenerale estas proleta (krom du), en ĝi mankas optimismo. Sed tio

ne estas baro por alte taksi la libron.

Verŝajne, la stilo de la tradukoj estis unuecigita, ĉar mi povis tralegi ĉiun rakonton glate. En "Kaŝita Kristfesto" troviĝas pluraj anglaj vortoj, el kiuj nur du estas klarigitaj. Malmultaj prezeraroj troviĝas krom aldonita listo de korekto. Ne mankas ankaŭ la neologismoj, kun klarigo en glosoj.

Mi konkludas, ke ĉiuj verkistoj en tiu ĉi volumo meritas esti konataj tutmonde.

J. Umeda

Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto (4)

— “Narayama-busi kō” —

Venis la dekdua monato, kaj kun ĝi la severa vintro. Ĉar la luna kalendaro estis observata, la mezo de la monato markis la komencon de la plej malvarma sezono. Unu tagon Rin aŭdis la infanojn ĝojadi kriante:

— Jen la neĝinoj flirtante venis!

— Memoru, ekdiris Rin vigle — ke kiam mi iros al la Monto, tiam nepre neĝos!

La “neĝinoj” estis la nomo por la blankaj libeletoj, kiuj aperas kaj flirtas, laŭdire, antaŭ neĝado.

Laŭ la ventro de Matu estis certe, ke ŝia horo estas proksima: ŝiaj movoj kaj spirado estis okulfrape malfacilaj.

Mankis nur kvar tagoj ĝis la novjaro. Frumatene, kiam Tatuhei ellitiĝis, Rin senpacience kondukis lin eksterdomen kaj flustris en lian orelon:

— Hodiaŭ vespere mi volas venigi al ni la personojn, kiuj iam eskortis al la Monto. Vi do iru por inviti ilin!

Tio atestis, ke Rin estas decida fari pilgrimon jam la postan tagon, kaj ĉi-vespere, venigi al si la personojn, kiuj iam iris al la Monto, por sake-regalado. Sed ŝiaj subitaj vortoj embarasis Tatuhei, ĉar li planis, ke ŝia pilgrimo okazu iam en la nova jaro.

— Ankoraŭ iom tro frue!, li diris, — ĝi estu en la nova jaro!

— Tute ne, rediris Rin — eĉ se iom tro frue, ne gravas. Des pli bone, ke mi iru antaŭ ol vidi mian ratidon!

La malvolonta Tatuhei faris nenian respondon. Rin urĝis:

— Nu, vi tuj iru kaj sciigu al ili. Se vi malfruos, ili ĉiuj forestus en la montoj ĉe laboro!

Ŝia dirmaniero havis la tonon de absoluta ordono, al kiu Tatuhei ne povis ne obei. Li ekiris. Rin vortoŝutis sur lian dorson:

— Faru kiel mi diris, ĉu vi aŭskultis? Alie, eĉ sola mi iros morgaŭ al la Monto!

En tiu vespero la invititoj kolektiĝis ĉe la domo de Rin. Sake-regalado estis nepraĵo en la antaŭvespero de ies pilgrimo al la Kverka Monto, kaj la invito estis limigita ekskluzive al tiuj, kiuj iam eskortis. Estis kutimo, ke ili en akompano de sake-trinkado donas la tutan instrukcion necesan por la pilgrimo. Kaj aŭskultadi ĝin klarigatan en detaloj konsistigis voton de l' aŭskultanto. La instrukcio doniĝis laŭ la strikte tradicia etiketo, en kiu la gastoj laŭvice recitas po regulon.

La kunvenintaj gastoj konsistis el sep viroj kaj unu virino. La virino eskortis la pilgrimon la antaŭan jaron. Malofta estis tia okazo, en kiu virino plenumis la taskon de eskortado tial, ke ĉiu familio, kiu ne havis taŭgan viron, ordinare petis viron de alia familio akompani la pilgrimon.

El la ok kunvenintoj, la viro, kiu unuavice iris al la Monto, nomiĝis “la plejaĝulo” kaj ties voĉo estis plej grava. Estis li, kiu ludis la rolon de korifeo kaj prezidis la grupon. Estis lia privilegio fari al si la unuan trinkon el la sake-kruĉo. Tiel la antaŭeco kiel en ĉio cetera decidiĝis laŭ la ordo, en kiu ili iris al la Monto.

Inter la hodiaŭaj kunvenintoj la plejaĝulo estis viro nomata “Kolerema Teru”. Kolerema li tute ne estis. Li estis viro de milda karaktero, ĉirkaŭ kvindekjara. Sed kelkajn generaciojn antaŭe vivis en lia familio viro, kiu estis fama pro tia temperamento. Jen la titolo “Kolerema” fariĝinta speco de famili-nomo, sed jam delonge perdinta la nuancon de moknomo.

Rin kaj Tatuhei, kvankam en sia propra domo, sidis hodiaŭ vespere en la honora loko, kiu ordinare estas destinita por gastoj, kaj ĉiuj invititoj en unu vico sidis fronte al ili. Antaŭ Rin kaj Tatuhei staris argil-kruĉego kun la preskaŭ unu too da sakeo, kiun Rin faris el la Blanka Lilio por la hodiaŭa soleno.

Teru unue faris riverencon en la direkto al Rin kaj Tatuhei. Sekvante lian ekzemplon, ĉiuj aliaj gastoj klinis la kapon sammaniere.

Poste, Teru sin turnis al Tatuhei kaj salutis:

— Por la pilgrimo suferoj ne mankas; vin ni simpatie dankas!

Nek Tatuhei nek Rin estis permesataj diri ion en la daŭro de tiu ĉi soleno. Salutinte, Teru levis la kruĉon al sia buŝo kaj el ĝi trinkis kiom li povis per grandaj glutoj. Poste, li pasigis la kruĉon al la dua sidanto. Tiu ĉi ankaŭ trinkis el ĝi kiom li povis per grandaj glutoj. En la sama maniero la kruĉo laŭiris ĉiujn unu post la alia ĝis ĝi denove staris antaŭ Teru.

Nun Teru sin direktis al Rin kaj diris per tono kvazaŭ deklama el ia libro:

— Por iri al la Monto troviĝas regulo, kiu devas esti nepre observata. Unue; kiam vi estos ĉe la montosupro, via parolo estos malpermesita.

Tiel dirinte, Teru levis la kruĉon al sia buŝo kaj el ĝi denove trinkis per grandaj glutoj, kaj pasigis ĝin al sia

najbaro. Rin kaj Tatuhei, ambaŭ jam bone sciis la enhavon de l' instrukcio, kiun oni donas al ili hodiaŭ vespere, ĉar ili ofte aŭdis ĝin el okaza konversacio de la vilaĝanoj. Laŭ konvencio, tamen, ili devis klini sian oreilon al ili en solena maniero, ĉar tio per si mem formis ilian voton antaŭ la gastoj. Ili do aŭskultadis absorbite.

La kruĉo laŭiris ĉiujn kaj poste estis metita antaŭ la dua sidanto, najbaro de Teru. Li nun adresis al Rin en simila tono:

— Por iri al la Monto troviĝas regulo, kiu devas esti nepre observata. Due; vi devas foriri al la Monto sen esti rigardata de aliaj personoj.

Poste, li prenis la kruĉon al siaj lipoj kaj el ĝi trinkis per grandaj glutoj. La kruĉo denove laŭiris ĉiujn kaj estis metita antaŭ la tria persono. Ankaŭ li adresis Rin en simila tono kiel Teru:

— Por iri al la Monto troviĝas regulo, kiu devas esti nepre observata. Trie; kiu hejmenvenos el la Monto, al tiu estos malpermesita rigardi returnen.

Poste li levis la kruĉon al siaj lipoj kaj el ĝi trinkis per grandaj glutoj. La kruĉo laŭiris ĉiujn kiel antaŭe kaj estis metita antaŭ la kvara persono. La unuaj tri personoj jam donis ĉiujn necesajn regulojn, kaj nun estas la vico de la kvara persono por eldiri instrukcion pri la vojo al la Kverka Monto.

— Jen la vojo al la Kverka Monto, li komencis. — Laŭiru la bazon de la monto malantaŭ la vilaĝo, kaj laŭiru pasante sub la ileksaj arboj, la bazon de la dua monto. Kiam vi supreniros la trian monton vi alvenos ĉe lageto. Rondiru ĉirkaŭ la lageto por tri fojoj, kaj poste trans la ŝtona ŝtuparo, supreniru la kvaran monton. Ĉe la montosupro vi vidos la Kverkan Monton for trans la valo. Laŭiru la valon en la distanco de

du kaj duona rioj.*) Dumvoje vi atingos lokon, kie la vojo kurbiĝas sepfoje. Ĝi nomiĝas la Sepvalo. Trans la Sepvalo vi devas fari al vi senvojan vojon, ĉiam suprenirante la krutaĵon inter la kverkoj ĝis vi atingos la kulminon de la Kverka Monto, kie la dio vin atendas.

Kiam li finis, la kruĉo denove laŭiris ĉiujn kiel antaŭe, kaj jen ĉio estas finita. Nun kiam la tuta instrukcio estas donita, neniu plu devis paroli. Krom la kvar personoj, kiuj deklaris la instrukcion, ĉiuj restis mutaj la tutan tempon. Poste, la kruĉo ankoraŭfoje laŭiris ĉiujn. Kiam ili trinkis ĝissate kaj ne plu povis trinki, ili mute formalaperis unu post la alia.

Teru restis sola ĝis la fino. Ĉar ĉiuj aliaj foriris, li ankaŭ ekstaris. Forironte, li fingro-gestis al Tatuhei, ke tiu post-sekvu lin eksterdomen. Malgraŭ ke neniu troviĝis en la ĉirkaŭaĵo, Teru, kvazaŭ homo ne sen ia skrupulo, observadis spione en la mallumon, kaj diris en subigita voĉo:

— Se vi ne volas, vi ne bezonas iri la tutan vojon ĝis la Kverka Monto. Sufiĉas, ke vi iru ĝis la Sepvalo, kaj de tie vi revenu hejmen.

Por kio Teru konsilis tian aferon, Tatuhei tiam ne komprenis kaj ne tro atentis tial, ke ĝi ŝajnis eĉ sensenca, se jam Rin tiel fervore impetas pilgrimi la tutan vojon al la Monto.

— Mi nur sugestas al vi tion, daŭrigis Teru — ĉar oni kutimas subsciigi ĝin post la soleno.

Tiel dirinte, Teru adiaŭis kaj foriris hejmen.

Post la malapero de ĉiuj gastoj, Rin kaj Tatuhei baldaŭ enlitiĝis. Sed Rin, pensante pri la morgaŭa pilgrimo, tute ne volis endormiĝi. Jam malfrue en la

nokto.

En la morta silento de la noktomezo ŝi aŭdis ploron de iu ekstere. Estis la voĉo de viro ploranta laŭte kaj senĉese. Lia plorkrio alproksimiĝis ĝis antaŭ ŝia domo. Samtempe ŝi aŭdis la kanton de "surda lulado" akompane kantatan, kiel de Matu iam, por superkrii la ploron.

*Purigu, purigu...
Pilgrimanton mi eskortas.
Ne piás li, sed fias,
ĉar kriante li sin tordas,
de l' ŝultroj pende pezas.
Purigu ĉiujn pekojn,
Purigu ĉiujn pekojn.*

Rin eklevis la kapon de la kuseno kaj streĉis la oreilon. Ŝi rekonis, ke la ploranto estas la maljuna Mata de la Moner-domo.

— Kia stultulo!, pensis Rin pri li, kiel ĉiam.

Post momentoj ŝi aŭdis la sonon de alpaŝado ekster la ĉirmpordo kaj tuj de sovaĝa ungogradado sur la pordotabulo. Kio? — Ŝi leviĝis el la lito kaj forŝovis la ĉirmpordon, de kie la gratado ŝajnis veni. Tie ekstere en la lunluma helo kaŭris Mata kun sia kapo kaŝita sub ambaŭ manoj kaj sia tuta korpo tremetanta. Tiam alia viro alkuris. Tiu estis la filo de Mata. Kun kaptŝnuro en la mano li ekhaltis antaŭ sia patro, ĵetante al li fiksan rigardon de kolero.

— Tatuhei! Tatuhei! vokis Rin.

Verŝajne li ankaŭ ne estis dormanta, ĉar li elvenis senprokraste. Lia rigardo kruciĝis kun tiu de la filo de la Moner-domo. Vidante la ŝnuron en ties mano, li demandis lin, kio okazis.

— Tiu ĉi diablo dismordis la ŝnuron kaj liberigis sin for!, la filo respondis

ĉiam ankoraŭ fiksan la koleran rigardon al sia patro. Kia senhontulo — Tatuhei pensis pri la filo, ŝokite de lia bruteco. Kia senhontulo — Rin pensis siavice pri Mata, kaj gape rigardadis lin. Ŝi rememoris malnovan kanton, kiu diris:

*Kiom fortis 'surda luló'?
Ne nur la ŝnur' rompiĝis
dum pilgrim' de l' obstinulo,
sed ankaŭ homa ligo.*

Pli infera ol tia kanto, Rin pensis, estas la mizero de Mata, torturita per "surda lulado" tiom, ke ne nur la ŝnuro rompiĝis, sed li eĉ estas kalumniata de sia filo, ke li morde tranĉis ĝin.

— Mata, admonis Rin en riproĉa tono, — vi devas honti, ke vi estas regalita per surda lulado! Via ŝnuro estas rompita, sed kion vi farus, se via ligo kun la dio kaj la filo estus rompita dum vi ankoraŭ vivas?

Rin estis sincera esprimante kion ŝi kredis vera.

— Ne plu faru hodiaŭ nokte, konsilis Tatuhei al la filo de Mata.

Tatuhei mem portis Mata sur sia dorso kaj liveris lin ĝis la Moner-domo.

La postan nokton Rin, vipante kaj kuraĝigante al la ŝanceliĝema Tatuhei, startis al sia pilgrimo al la Kverka Monto. Ŝi estis tiom zorgema, ke jam en la vespero ŝi lavpurigis la rizon, preta por ke ŝiaj familianoj kuiru ĝin la morgaŭan tagon, kaj al Tama jam donis la vorton pri la konservataj fungoj kaj trutoj. Tiel, ŝi atendis ĝis horo kiam ĉiuj aliaj familianoj silentiĝis en dormo, kaj senbrue forŝovis la ĉirmpordon. Eksterdome, Tatuhei metis ŝin sur la portabulon ĉe sia dorso. Kaj ili ekiris.

La nokto estis senventa, sed la malvarmo estis tranĉa. La ĉielo estis nub-

kovrita. Sen la lunhelo la vojo estis nigre malluma tiel, ke li devis fari palpajn paŝojn de blindulo.

Apenaŭ ili forpaŝis, Tama haste leviĝis el la lito, kaj malferminte la pordon ŝi eliris. Mane apogante sin ĉe la stumpo, ŝi adiaŭe rigardadis en la mallumon, kien ambaŭ foriris.

Tatuhei laŭiris la bazon de la monto malantaŭ la vilaĝo, ĉis li alvenis sub la ileksaj arboj. Tie, super lia kapo volbiĝis per la densaj branĉoj en formo de baldakeno, kaj la morta mallumo tie donis al li tremigan senton kvazaŭ li enpaŝus en la internon de groto. Ĝis ĉi tie la vojo ne estis fremda al li, sed la plua vojo estis por generacioj permesita al neniu krom tiuj, kiuj pilgrimas al la Kverka Monto. En ordinara vojiro, li do neniam enpaŝis tiun vojon kaj tie prenis vojeton aŭ dekstren aŭ maldekstren, — sed nun li paŝis rekte antaŭen. Poste, li laŭiris la bazon de la dua monto; ankaŭ tiun de la tria monto, kaj baldaŭ li alvenis antaŭ lageto. La ĉielo apenaŭ ekheliĝis, sed en la horo kiam li finis la rondiradon ĉirkaŭ la lageto je la tria fojo, venis la aŭroro. Troviĝis tie tri ŝtonaj ŝtupoj. Trans ili la vojo fariĝis kruta. Tiun ĉi vojon de la kvara monto li devis ĉiam supreniri ĝis la zenito. Ĝi estis sufiĉe alta monto. Ju pli li supreniris, des pli kruta fariĝis la deklivo.

Atinginte ĉe la supro Tatuhei paŭzis kaj superrigardis la panoramon antaŭ si per mirokuloj. Transe staras la majesta Kverka Monto kvazaŭ atendanta lin. Inter tiu monto kaj ĉi tiu, sur kiu li staris, kuŝas la abismo de krutvalo, kies profundo ŝajnis engluti homojn en inferon. Por marŝi al la Kverka Monto li bezonis iri unue iom suben de la montosupro, kaj laŭiri la vojeton, kiu kvazaŭ strio da breto zonis la monton. Minacis lin dekstre la profundegaĵo de

*) 1 rio = 3.9273 kilometroj

la krutvalo kaj maldekstre, la alta klifo de la monto. La valo, kiu estas vaste enfermita de kvar montoj, ŝajnis faŭko de l' infero. Tatuhei devis fari tre antaŭen, sed riskajn paŝojn antaŭen.

La distanco por laŭiri la valon, oni diris, du kaj duona rioj, sed tio estis indiferenta al Tatuhei. Ĉar li, impetante al la Kverka Monto, jam sentis nenion en si krom la aŭtomata paŝado de siaj piedoj antaŭen. De la unua momento, kiam li ekvidis la Kverkan Monton, li jam fariĝis kvazaŭ servanto de la dio loĝanta tie, kaj mute paŝadis, kiel se li estus sorĉita per ordono de la dio.

Li alvenis ĉe la Sepvalo. La Kverka Monto staris ĵus antaŭ liaj okuloj. Pasinte la Sepvalon, oni instruis, li devas fari al si senvojan vojon. Li ĉiam iris supren — rekte antaŭen. Nun la arboj troveblaj tie ĉiuj estis la kverkoj. Ili konvinkadis Tatuhei, ke li fine estas en la Kverka Monto kaj li rememoris ke li devas nun paroli nenion. Rin siavice parolis nenion depost la momento kiam ŝi forlasis sian hejmon. Eĉ se Tatuhei alparolis ŝin dumvoje, ŝi nenion respondis.

Li supreniris plu kaj plu, sed li trovis nur la kverkojn ĉirkaŭ si. Finfine, li atingis lokon, kiu ŝajnis al li la montosupro. Tie li trovis rokon apud siaj piedoj. Apenaŭ li preterpasis ĝin, li rimarkis homan estaĵon sub ĝi. Li estis ŝokita kaj pro teruro regresis je kelkaj paŝoj. Tiu, kiu sidas klinita antaŭen kun la dorso ĉe la roko, estis kadavro. La manoj de la kadavro estas plektitaj ĉe l' antaŭo kvazaŭ por preĝo. Tatuhei rigidiĝis starante kiel se liaj piedoj estis enradikitaj en la grundo. Tiam Rin etendis sian manon el post lia dorso kaj svingis ĝin en la antaŭan direkton. Ŝi tiel gestis, ke li plu paŝu. Li do ekmarŝis antaŭen. Baldaŭ li ekvidis duan rokon kaj tie, skeleton kun ĉiuj

ostopartoj disĵetitaj kvazaŭ de ia malica mano: la kruroj restantaj en sia loko, sed la kranio defalinta kaj kuŝanta renversite apud ili; la spino kaj riboj pendantaj spalire sur la roko, simile al la pozo de la unua kadavro, kiun li ĵus antaŭe vidis; kaj izolite la metakarpeoj kuŝantaj unu for de l' alia. Rin denove etendis sian manon kaj faris geston: antaŭen! antaŭen!

Kie estis roko, ĉie estis skeleto. Li pluiris. Nun li trovis ĉe la piedo de arbo freŝan korpon, kiu ŝajnis ankoraŭ duonviva. Ŝokite li ekhaltis. Tiu korpo ekmoviĝis antaŭ liaj okuloj? Li fikse rigardis en ĝian vizaĝon. Ne, ĝi estis kadavro kiel la aliaj. Kaj tamen — ĝi ekmoviĝis! La piedoj de Tatuhei rigidiĝis. La kadavro denove ekmoviĝis, io sub la brusto! Kio moviĝis, jen estis korvo. Tio estis nerimarkebla ĝis nun pro la nigra kunkoloro de la kimono. Tatuhei minace batis la teron per piedo. Sed la korvo restis tie, kie ĝi estis. Tatuhei preterpasis ĝin, tiam ĝi flugis supren, arkante per la flugiloj en lanta maniero sentima je homo. Li rerigardis al la kadavro, kiam li trovis tie alian korvon sub la brusto. Apenaŭ li ekrimarkis ĝin, jen la kapo de ankoraŭ la tria korvo moviĝis sub la dua. Li pensis, ke la korvoj formanĝis la ventron kaj en la kadavro nestas. Li eksentis abomenon kaj malamon, kiam li imagis, ke ankoraŭ pli multaj troviĝus interne!

Kvankam Tatuhei konsideris ke li jam estas sur la montopinto, la deklivo kondukas ankoraŭ supren. Ju pli li iris, des pli multajn korvojn li vidis. Ili multope paŝadis malrapide, kraketante sur la falintaj sekaj folioj, kvazaŭ homoj surtretus ilin. Tatuhei estis mirigita pro ilia granda nombro. Ili cetere ŝajnis al li ne birdoj sed nigraj katoj kun akraj okuloj. Estis io horora en la sentima

maniero de ilia paŝtado.

Li pluiris. La skeletoj kuŝis pli multaj tie kaj ĉi tie. Post kelka distanco li alvenis ĉe kalva loko riĉa je rokoj. Tie la grundo estis ĉie blanka kun la skeletoj kuŝantaj kiel neĝamasoj. Kun sia kapo klinita suben, Tatuhei faris zorgajn paŝojn, evitante surtreti la ostojn, sed dum li iris, li sentis vertiĝon, stumblis kaj preskaŭ falis. Inter ĉi tiuj blankaj skeletoj, li diris al si, devas troviĝi kelkaj homoj, kiujn li konis dum ili ankoraŭ vivis. Tiam li trafis lignan ritzason sur la tero, kaj ekhaltis mirigita. Eĉ ĝis ĉi tie, iu portis kun si la ritzason! Lin obsedis la miksita sento de admiro kaj malgajo, ke iu antaŭulo kunportis ĝis ĉi tie eĉ la manĝilon, dum li ne portis tian.

Sur proksima roko staris korvo lin rigardanta per suspektemaj okuloj. Tatuhei levprenis ŝtonon per la mano kaj ĝin forĵetis al la birdo, kiu alarmite deflugis de la roko. Kun ĝi, ĉiuj aliaj korvoj en amaso leviĝis supren. Se ili tiel fuĝas, Tatuhei pensis, ne verŝajnas, ke ili atakus vivantan homon. Per tiu penso, li kvietigis al si la koron.

Ankoraŭ la deklivo iras supren. Li plue marŝis kaj alvenis ĉe roko, kie ne troviĝis kadavro nek skeleto. Tie, Rin mane frapetadis la ŝultrojn de Tatuhei kaj eksvingis siajn piedojn por signi, ke tie ĉi estu demetita de la porttabulo. Li do mallevis la porttabulon de ĉe sia dorso. Rin detabuliĝis. Ŝi sternis sian pajlomaton ĉe la bazo de la roko. Ŝi deprenis pakaĵeton, kiun ŝi portis ĉe sia talio, kaj estis ligonta ĝin al la porttabulo de Tatuhei. Subite, Tatuhei en kolera mieno forprenis la pakaĵeton kaj ĝin lasis sur la pajlomato apud Rin. Rin malfermis la pakaĵeton kaj elprenis unu rizbulon, metis ĝin sur sia pajlomato kaj la pakaĵeton provis denove ligi al la

porttabulo. Tatuhei rabe fortiris al si la porttabulon, kaj metis la pakaĵeton denove sur la pajlomaton de Rin.

Rin rekte staris sur la pajlomato. Ŝi kunplektis la manojn brustonivele kaj streĉis ambaŭ kubutojn kiel du aloj, kaj fikse rigardadis antaŭ sin. Ŝi portis ĉirkaŭ siaj lumboj la krudan ŝnuron de pajlo anstataŭ la ordinaran zonan. Tatuhei rigardis ŝian vizaĝon. Li rimarkis, ke ĝi ne plu estas la vizaĝo, kiun li konadis ĉe la hejmo, ĉar sur ĝi estis aperinta la unua signo de morto.

Rin etendis sian manon al sia filo kaj kaptis lian. Ŝi ĉirkaŭturnis lin en la direkton, de kie ili ĵus alvenis. Li tiam sentis sin kvazaŭ banita en bolanta akvo, kun la tuta korpo saturita de grasa ŝvito. Lia verto ekfumis per ŝvitvapor.

Rin pli forte premis al Tatuhei la manon, kaj poste donis fortan ekpuŝon al lia dorso.

Li ekpaŝis — paŝadis sen rigardi returnen laŭ la regulo de la Monto. Ĉirkaŭ dek paŝojn li iris, kiam li, kun la malplena porttabulo ĉedorse, komencis elverŝadi grandajn gutojn de larmo. Li malsupreniris per senfortaj paŝoj kvazaŭ de ebriulo. Post kelkaj paŝoj, li stumblis je kadavro kaj falis, trafinte per unu mano en ĝian vizaĝon, kiu sub lia nazo kuŝis kun la griza kranio elrigardanta el inter la putranta karno. Baraktante restariĝi sur siaj kruroj, li denove vidis la vizaĝon kaj rimarkis ke la kolo de la kadavro estas volvita en ringo de ŝnuro. Li lasis fali sian kapon kaj ekĝemis: "Tian kuraĝon mi neniam havus!" Kaj li daŭrigis la vojon malsupren.

Kiam li malsupreniris la Kverkan Monton duone, tiam li vidis flirti antaŭ siaj okuloj blankajn erojn. Li ekhaltis kaj fikse rigardis antaŭ sin. Inter la kverkoj flirtas blankaj flokoj.

— Neĝo!, li ekkriis.

La neĝflokoj kirliĝis kaj fariĝis ĉiam pli densaj. Jen fariĝis precize kiel Rin diradis: “Kiam mi iros al la Monto, tiam nepre neĝos”.

Subite, Tatuhei direktis siajn piedojn returne, kaj komencis denove supreniri la Monton, spite la regulon kaj la voton, kiuj en tiu ĉi momento jam estis forblovitaj kiel polvo. Li volis sciigi al Rin, ke la neĝo venis kiel atendite. Ne, sed nur por jubili kun ŝi, ke la neĝo venis! Unu vorton kaj nur unu fojon ankoraŭ li volis paroli al ŝi, ke la neĝo venis! Kiel simio li suprenkuris la malpermesitan vojon.

Kiam li atingis apud la roko, kie Rin sidis, la grundo estis jam tapiŝita per neĝo. Kaŝante sin post la roko li spionis pri Rin. Li jam pekis, jen rigardinte returnen, jen reveninte la malpermesitan

vojon, kaj nun li estas ankoraŭ romponta la voton de silento. Li sentis sin kulpa je ia krimo. Sed ja per Dio neĝis kiel Rin antaŭdiris, kaj kial li ne diru unu jubilan vorton al ŝi?

Li levis sian kapon el post la roko. Transe, sub liaj okuloj, sidis Rin tegmentita per la pajlomato de sur la kapo pende sur la dorson por ŝirmi sin kontraŭ la neĝo. Sed la neĝeroj jam amasis sur ŝiaj fruntharoj, brusto kaj genuoj. Fikse rigardante ĉe unu punkto antaŭ si, ŝi fervore alvokadis la nomon de Budao. Tatuhei vokis ŝin en laŭta voĉo:

— Panjo! Neĝis!

Rin trankvile etendis sian manon, gestante kvazaŭ por diri: iru hejmen! iru hejmen!

— Panjo, mi timas ke vi frostas en la korpo?



← “Japana Ĝardeno”
de la Huntington
Biblioteko, Los
Angeles.



Parto de “Japana Parko” →
en San Francisco

Fotoj de E. Ito

Rin nee skuadis la kapon. Tatuhei ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis, ke jam neniuj korvoj troviĝas tie. Kredeble la neĝado forpelis ilin al foraj vilaĝoj aŭ al iliaj nestoj. Ĉiuokaze — li estis feliĉa ke la neĝo falis, ĉar cetere por Rin estos pli varme sidi enfermite de la densa neĝo, ol esti elmetata al la akra vento de la monto. Kaj en tia kvieta stato ŝi sidados ĝis la momento de sia endormiĝo.

— Panjo, vi estas benata per neĝo! diris li kaj aldonis version el kanto: “Ĉe la supro de la Monto!”

Rin kapbalancis jese. Ne rigardante lin, ŝi etendis sian manon en la direkto de lia voĉo kaj per ĝi gestis: iru hejmen, iru hejmen!

— Panjo, ja neĝis kiel vi diris!

Post tio kiel adiaŭo, li komencis mal-suprenkuri la deklivon kiel leporo. Li salte rapidis kvazaŭ por eskapi ion, kvazaŭ li timus esti rimarkata de iu, ke li rompis la regulojn de la Monto.

Kiam li alvenis ĝis la Sepvalo, tiam li vidis antaŭ si tra filigrano de neĝado la filon de la Moner-domo, kiu ĵus demetas de sia dorso la porttabulon. Sur la porttabulo, lia maljuna patro Mata estis alfiksita — kvazaŭ krimarestito — per la kruda ŝnuro el pajlo. Kun sponta ekkrio de surprizo, Tatuhei ekhaltis, ĉar la filo manipulas forpuŝi sian patron en la senfundan inferon de la krutvalo, ĉirkaŭita de la kvar montoj. Nur tiam Tatuhei rememoris la vortojn, kiujn Teru subdiris al li hieraŭ vespere: “Se vi ne volas, vi ne bezonas iri la tutan vojon, sed sufiĉas, ke vi iru ĝis la Sepvalo kaj de tie revenu hejmen!” Li nun komprenis la plenan sencon de tiu admono.

Mata — eskapinta hieraŭ nokte — hodiaŭ estis kiel bobeno ĉirkaŭvolvita fikse per la kruda ŝnuro el pajlo. Lia filo

rulis lin sur la tero, ne kiel homan estaĵon, sed kvazaŭ sakon da batatoj. Li puŝadas lin per ambaŭ manoj por faligi lin en la valon. La fingroj de Mata, kiuj sole estas liberaj el inter la maŝaro de ŝnuro, kaptis per sia tuta forto la kolumon de la filo. La filo penadis forskui ilin de si, sed la fingroj de l’ alia mano de Mata hoke kaptis la ŝultron de lia kimono. Mata kuŝis laŭlarĝe de sia korpo, kun la piedoj jam duonfale en la valon. Al la rigardanta Tatuhei ili aspektis kvazaŭ ili okupiĝus en ia silenta sporto. Subite la filo eksvingis unu piedon posten kaj per ĝi forte bategis en la ventron de Mata. La korpo de Mata renversiĝis for de la rando de la klifo — kapantaŭen kaj vizaŭ-al-ĉiele. Ĝi turniĝis dufoje en la aero kaj rulcilindre falis laŭ la krutaĵo en la fundon de la valo.

Tatuhei rigardis en la valon. Tiam el la fundo de la valo leviĝis en formo de ia trombo, ia vomanta kolono de nigra fumo, granda svarmo da korvoj. Tatuhei tremis pro hororo. La korvoj flugis supren kaj alte super lia kapo ĉirkaŭflugis kvakante en granda tumulto. Li pensis, ke ili havas siajn nestojn ie en la abismo kaj tie ili ripozis pro la neĝo. Certe Mata falis tien!

La korvoj por kelka tempo ĉirkaŭflugis en la aero, sed baldaŭ komencis mallevi i en la fundon de la abismo. Viva nutraĵo por la korvoj! Tatuhei ektemis je ilia nombro. Sed li pensis, ke Mata probable estus mortinta antaŭ ol li atingis la fundon. Li nun direktis sian rigardon al la filo de Mata. Tiu devas esti same terurita je la granda svarmo de korvoj. Kun la malplena porttabulo ĉedorse tiu jam forkuris galope, kiel se liaj piedoj neniam tuŝus la teron.

Kia la patro, tia la filo, pensis Tatuhei. — Estas nature, ke ili eĉ ne volis fari regaladon al la vilaĝanoj!

Li rigardadis post la filon de Mata, kiu lupe forkuras — kapantaŭen kun la dorso kurbigita.

La neĝo faladis ĉiam en pli grandaj flokoj. Kiam Tatuhei revenis ĝis la vilaĝo, jam vesperiĝis kaj estis malhele. Kiam li proksimiĝis al la hejmo, li pensis, ke la bebo certe sopiregas al sia forestanta avino. Kiel li respondu, li diris al si aflikte, se ĝi demandus lin, kiam la avnjo revenos? Li alvenis antaŭ sia domo, ekhaltis ĉe la pordo kaj spionis en la internon. Endome, lia dua filo vartas la bebon, kantante:

*Ĉu l' avnjo estas lasita
en la monto ĝismorte?
Sed krabo baldaŭ alpaŝos
rampe, plore, ĝisporde.*

Laŭ tiu kanto Tatuhei perceptis, ke la infanoj jam scias la aferon de Rin kaj babiladis pri ĝi. Ĉiu kanto, kiun ili tiam kantas, temis pri krabo.

*Eĉ se l' krabo sin enŝovas,
oni ne enlasu ĝin.
Sed ĉu plori krabo povas?
Kantas nokta birdo mur.*

En la pli antikva tempo la vilaĝanoj forportis grandaĝulojn al la montoj mal-antaŭ la vilaĝo kaj tie lasis ilin formorti. Iam oni forportis maljunulinon, sed ŝi baldaŭ revenis hejmen rampante. Tio kaŭzis tumulton al ŝiaj familianoj. “Ŝi rampis hejmen”, ili diris unu la alian, “ŝi rampis hejmen kiel krabo!” Kaj ili riglis la pordon por ke ŝi ne eniru. En la domo ĉiuj malgrandaj infanoj kredis, ke la vera krabo alrampis. La maljunulino forlamentas la tutan nokton ekster la pordo. Aŭdinte ŝian ploradon, la infanoj

rimarkis: “La krabo ploras!” “Ne”, diris iliaj gepatroj, sed pensante, ke estos vane klarigi la aferon al la etuloj, aldonis: “ĝi ne estas krabo ploranta, sed nur nokta birdo kantanta”. Jen la origino de la krab-kantoj.

Tatuhei staradis ekster la pordo, aŭskultante la kanton de la infanoj. Ili kantadis nur pri la krabo: ili do jam sciis, ke Rin neniam revenos. Tiu konstato faris la koron de Tatuhei iom malpeza. Li demetis la porttabulon de sia dorso kaj frapfrapis de si la neĝerojn. Kiam li malfermis la pordon, Matu venis el la kuirejo. La zono, kiun ŝi portis ĉirkaŭ sia masiva ventro, estis tiu striita, kiun Rin uzadis ĝis antaŭhieraŭ. Tra la pordo, el kiu Matu venis, li ekvidis ankaŭ Kesakiti. Ĉi tiu aguris, mantele metinte sur siaj ŝultroj la vatitan kimonon, kiun Rin estis tiel nete faldinta antaŭ sia foriro. Flanke de li kuŝis la sake-kruĉo. Evidente li estas ebria pro la restaĵo de sakeo. Li estis kvazaŭ en ekstazo, kaj kun la ebrie vagantaj okuloj li rigardis antaŭ sin kaj murmuris:

— Benata...hm,...neĝis...avnjo...
benata...ĉu ne...vere neĝis!

Tatuhei ankoraŭ staris ĉe la pordo. Liaj okuloj serĉis sian edzinon Tama, kiu tamen estis netrovebla.

Li faris al si profundan ĝemspiron. Rin fartus ankoraŭ vivante ĉe la roko for en la Monto. Se jes, ŝi nun eble rememoras sub la neĝa mantelo tiun kanton pri vatita kimono, kiun la vilaĝanoj ofte kantas:

*Malgraŭ frosto, ni ne povas
al nia pilgrimonto
lasi la vatitan kimonon
forporti al la Monto.*

FINO

Eljapanigis: Teruo Mikami